

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

102-a jaro • n-ro 1229 (10) • **Oktobro 2009**

SES 2009

malvirtuala renkontiĝo de *lernu!*-uzantoj



Poetoj detruas nian lingvon De Bjalistoko al Havano Fotoraporto pri IJK Konferenco de ILEI

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788

✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
BIC: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 195 ... Poetoj detruas nian lingvon (Anna Löwenstein)
- 196 ... Retrorigarde al la 94-a UK: La junulara programo (Irek Bobrzak)
- 197 ... De Bjalistoko al Havano (Maritza Gutiérrez Gonzáles);
Salutmesaĝo de Hanna Zamenhof-Zaruski
- 198 ... Inaŭgura parolado de la prezidanto (Probal Dasgupta)
- 199 ... István Szerdahelyi: vivo, verko kaj heredado (I.K.);
UEA premiis, diplomis kaj subvenciis
- 200 ... Fotoraporto pri Internacia Infana Kongreseto 2009 en Supraśl
apud Bjalistoko, Pollando (Tomasz Lewak kaj Bert Schumann)
- 201 ... Per amo, amikeco kaj solidareco la movado plifortiĝu en la tuta mondo
(Hori Jasuo)
- 202 ... 42-a Konferenco de ILEI: Turnopunkta evento en Krakovo
(Stefan MacGill)
- 204 ... Zamenhof-jaro 2009: L.L. Zamenhof kaj Palestino (Johan'-Luko Tortel)
- 205 ... Kongresa omaĝo al Lapenna
- 206 ... Recenzoj: Sabine Fiedler pri *Vortludoj kaj luda komunikado
en Esperanto. Lingvaj premisoj, tipoj, specifeco kaj antologieto*
- 207 ... Luiza Carol pri *Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi*.
- 208 ... Gonçalo Neves pri *Ido, unu jarcenton poste*
- 209 ... Laste aperis
- 210 ... Profesoro Jansen
- 211 ... Oficiala informilo; Kotiztabelo de UEA por 2010
- 212 ... Ĝenevo: Zamenhof-memortabulo reinaŭgurita (Arlette Di Vetta)
- 213 ... SES 2009 – malvirtuala renkontiĝo de *lernu!-uzantoj* (Peter Baláz)
- 214 ... Forpasoj

KOVRILPAĜE: Somera Esperanto-Studado allogis al la slovakia urbeto Modra
naŭdekon da lernemuloj el dudeko da landoj. Sur la foto de Peter Novotníček pozas
SES-anoj dum ekskurso al la burgo Devín apud Bratislavo (legu pli sur la p. 213).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T.
Road, IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2359 7731;
✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado):
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79
21 [h], ✉ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino

Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,
NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori
Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27,
JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken,
Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José
Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto
Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h],
+56 65 344606 [of], ✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO:

S-ro Gregor Hinker.

Observanto de ILEI:

S-ro Stefan MacGill.

Poetoj detruas nian lingvon

Oni ofte aŭdas – efektive temas pri fakto vaste rekonata – ke la literaturistoj grave kontribuis al la evoluigo de Esperanto. Mi ne kontraŭstaras tion: la literaturistoj ja grave kontribuis – sed tio ne signifas ke ilia kontribuo estis pozitiva. Eĉ male.



Se oni serĉas tra PIV oni trovas amason da vortoj kun la indikoj G (Grabowski) aŭ K (Kalocsay), ekzemple *insurekcio*, *beata*, *uvo* (G) kaj *lazura*, *lontana*, *pita* (K). Tio montras, ke tiuj verkistoj estis inter la unuaj, kiuj uzis tiujn vortojn en Esperanto.

Se oni protestas kontraŭ la uzo de tiaj vortoj, literaturistoj klarigas, ke ili nepre bezonas “literaturan lingvon”. Kial? Kial ili ne povas esprimi siajn pensojn kaj emociojn per la normala vortprovizo, kiun uzas ĉiuj? Kial laŭ ili la vorto *trista* tuŝas la koron pli ol la vortoj *senĝoja* aŭ *kordolora*? Kial *lazura* estas pli poezia ol *ĉielblua*?

Poetoj asertas, ke la *mal*-vortoj estas maloportune longaj, kaj tial ili bezonas pli mallongajn alternativojn. Sed unu el la trajtoj de poemo, kontraste kun prozo, estas ke ĝi estas verkita laŭ pli rigida skemo. La lerteco de la poeto konsistas interalie el ties kapablo esprimi ideojn interne de tiu skemo. Se por solvi problemon pri silabonombroj li/ŝi tutsimple inventas novan vorton, kie troviĝas la poeta lerto?

Vorto kiel *malmultekosta* ja estas longa – sed ĝi ne enhavas pli da silaboj ol la samsenca itala vorto *economico*. Sed neniuj itala poeto, laŭ mia scio, iam plendis, ke tiu vorto estas tro longa, des malpli ordinara parolanto. Do, kion faras la italaj poetoj? Ili faras tion, kion poetoj ĉiam faras: streĉas sian cerbon kaj elpensas traŭ esprimon interne de la rimedoj, kiujn la lingvo jam proponas al ili. Tio estas la tasko de poeto. En Esperanto, ekzemple, oni povus anstataŭigi la vorton per pluraj alternativoj: *bonpreza*, *senvalora*, *malluksa*, *trigroŝa*.

Strange, la argumento pri troa longeco ial forgesiĝas, kiam poeto nepre deziras uzi la vorton *firmamento* anstataŭ *ĉielo*. Estas vere, ke al parolanto de la angla aŭ la franca *firmamento* efektive havas iom poezian sonon, ĉefe ĉar oni renkontas ĝin nur en poeziaj kuntekstoj. Tial Esperantaj poetoj enportis ĝin en sian “poezian lingvon”. La vorto tamen ne troviĝas en neparencaj lingvoj: en la finna ekzemple, aŭ en la japana. Do, kion pensas finno aŭ japano legante tiun vorton? Ĉu ĝi trafas aparte poezie? Pli verŝajne, tio estas simple nova vorto por serĉi

en la vortaro, vorto kiun poste necesos lerni. Ĝia poezia kvalito ne estus klara al homo, kiu neniam renkontis ĝin antaŭe. Interese, “ĉiela volbo”, per kiu PIV difinas ĝin, al mi impresas multe pli poezie ol la neanalizebla vorto *firmamento*.

Iam, nesperta itala esperantistino petis min lingve kontroli poemon, kiun ŝi mem verkis. En tiu poemo mi trovis la eksterordinaran vorton *krepitas*, kaj serĉante en PIV mi malkovris, ke tio signifas “Aŭdigi kraketadon, serion da etaj sekaj eksplodbruoj”. Mi do sugestis, ke ŝi uzu anstataŭe *kraketas*. Ŝi respondis, ke ŝi nepre deziras *krepiti*, ĉar tio apartenas al ŝia poezia stilo. Sendube al italo tiu vorto sonas tre bele, ĉar ĝi pensigas pri la itala verbo *crepitare*. Al mi, kiu ĝis tiam neniam renkontis tiun nekutiman verbon, ĝi impresis nur strange kaj eĉ malelegante.

Unu el la plej konataj poemoj en Esperanto estas *La vojo* de Zamenhof. Ĝi estas plena je esprimoj, kiujn esperantistoj ankoraŭ nun konas kaj citas: “rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante”; “eĉ guto malgranda, konstante frapante...”; “ni semas kaj semas konstante”. Kaj tamen tiuj esprimoj, kaj fakte la tuta poemo, utiligas nur la plej simplajn vortojn, vortojn kiujn oni uzadas en sia ĉiutaga babilado. Same oni povas diri pri lia traduko de *Hamleto*.

Nesperta esperantisto verŝajne devus serĉi la vorton *histriko* en vortaro (temas pri besto kun longaj pikiloj), sed krom tio la vortprovizo ne prezentas apartajn problemojn.

Se la literatura vortprovizo restus nur en la poezio, mi ne sentus la bezonon verki ĉi tiun artikolon. Sed dum la lastaj dudek jaroj tiuj literaturaj vortoj ĉiam pli emas migri en la normalan lingvouzon; tial en ordinara babilado oni nuntempe ofte aŭdas la vortojn *kurta*, *povra*, *uvo* ktp. Verŝajne la uzantoj eĉ ne konscias, ke tiuj vortoj estas iamaj inventaĵoj de poetoj, kiuj deziris distingi sian lingvouzon de tiu de la ĉiutaga vivo. Farante

tion, la verkistoj grave malutilis al Esperanto, kies vortprovizo tiom kreskegas, ke la Esperanta vortaro iom post iom minacas fariĝi same ampleksa kiel tiu de la angla. Kaj cetere, kion faros nun la literaturistoj, kies vortelektio perdis sian elitajn karakteron kaj fariĝas tiu de la ĉiutaga parolado? Ĉu ili kreos novan vortostokon por plumontri sian superecon al la ordinara parolantoj?

La ĉarmo de literatura stilo dependas de la trafeco de la elektitaj vortoj, de ilia kapablo precize sed samtempe elegante transdoni al la menso de la leganto la esprimatan ideon. Bona literaturo konsistas precipe el la enhavo. Se oni dependas ĉefe de belsonaj vortoj por doni poezian nuancon al teksto, oni kreas nur dekoraciitan ŝelon: malplenan konstruaĵon kun nenio interne. **Anna Löwenstein**

Jen la parolado per kiu la mortinta reĝo de Danujo priskribas al Hamleto siajn suferojn en la posttomba vivo:

Mi estas la spirit’ de via patro,
Mi estas kondamnita longan tempon
Vagadi en la nokto kaj bruladi
La tutan tagon en eternaj flamoj,
Ĝis mi puriĝos de la ĉiuj pekoj
De mia tera vivo. Se ne estus
Al mi malpermesite paroladi,
Rakonton tian povus mi komenci,
De kiu ĉiu vort’ al vi disprenus
La koron, rigidigus vian sangon,
El kapo elsaltigus la okulojn,
Kaj ĉiun vian haron disstarigus
Simile al haregoj de histriko.



Retrorigarde al la 94-a UK

La junulara programo

En la komenca periodo de la UK-oj neniu parolis pri Junulara Programo. Junuloj tiam estis traktataj kiel plenvoloraj esperantistoj. Atestas tion i.a. brila organizado de la 2-a UK en Ĝenevo. Gravan rolon en ĝi rolis du apenaŭ maturaj esperantistoj, Edmond Privat kaj Hector Hodler.

Kio do okazis nun en Bjalistoko? Kadre de la Junulara Programo okazis kvin panel-diskutoj aranĝitaj de TEJO, PEJ, informadikistoj ligitaj kun E@I kaj sendependaj junaj aktivuloj.

TEJO instruis pri organizado de E-aranĝoj kaj renkontiĝoj, E@I pri efika uzo de komputilo kaj interreto, PEJ prezentis sian aktivecon kaj la junularan retan radion "Varsovia Vento Elsendoj", la aliaj siajn spertojn pri diversaj temoj. Fakte nenio nova, ja similajn proponojn oni povas trovi dum junularaj aranĝoj. Tamen ĉi-foje la aktiveco celis ne la junularon, sed ĉiun kiu aliĝis al la UK.

Jes, la junularo venis al la kongreso okupiĝi ne nur pri si mem, sed antaŭ ĉio prezenti siajn spertojn en la matura kongresa medio. *Kiaj povas esti la celoj de la esperantistaj eventoj? Kiel plani la buĝeton kaj gvidi la financon politikon? Kiaj estas la ideoj por akiri subvenciojn? Kiel elekti la aranĝolokon kaj kio gravas dum serĉado de la konformaj ejoj?* Jen kelkaj demandoj, al kiuj oni povis trovi respondojn kadre de la Junulara Programo. Sed ne nur. Oni povis ekscii kiel krei la programon, uzi la retajn ilojn kiel retpaĝo, projektmaĵstrumo, administra datumbazo ktp. En ĉio tio la esperantistoj, kiuj malkovris la potencon de la Interreto povis renkontiĝi kun la kreintoj de la retejo lernu.net, kaj partopreni diverstemajn informadikajn trejnadojn, kies celo estis pruvi, ke sendepende de la aĝo oni povas uzi la komputilon por realigo de esperantistaj ideoj.

Tiuj, kiuj sukcesis malkovri la malfermecon de la Junulara Programo, ĝuis ankaŭ la junularan etoson dum la kongresaj vesperoj kaj noktoj, kiam en la proksimaj amasejo kaj klubejo Gwint okazis koncertoj kaj kunaj ludoj. Kaj fariĝis normale, ke ne la aĝo sed la temperamento gravas. Prezentiĝis junularstilaj muzikistoj kiel Tone, Pafklik kaj la brazila rok-teamo Supernova, kies koncerto estis unu el la plej taŭgaj varbiloj por venigi junajn homojn al la UK. Kaj ĝi sukcesis. Al Bjalistoko venis multaj gejunuloj, kiuj miksiĝis kun la aliaj en unu gajan kaj internacian teamon.

Ne ĉio iris glate. Por la junaj aktivuloj estis malfacile esti aktivaj tuj post la tro aktiva semajno dum la IJK en Liberec. Longa vojaĝo de Ĉeĥio al la nord-orienta angulo de Pollando kaŭzis ke ĉiuj venis elĉerpitaj, pro kio la programo startis preskaŭ kun dutaga malfruigo. Sed ne nur tio malhelpis plenan sukceson. La salonoj, kie okazis la trejnadoj, prezentadoj

kaj prelegoj, estis elektitaj tro malproksime de la kongresa komplekso, en fora konstruaĵo. Malfacile estis trovi la lokojn. Krome manko de informoj en la kongresa libro rezultigis ne tro grandan interesiĝon pri la programeroj. La informaj afiŝoj ne multon helpis. Plie dum la prepartempo ne okazis trejnado de TEJO pri organizado de la programo. Alie eble ne okazus, ke samtempe en du diversaj lokoj koncertas JoMo kun Kim kaj Supernova. Evidenta programa miskompreno. Multaj bedaŭris tion, certe la artistoj mem.

Plendi facilas, same kiel kritiki. Malpli facilas agi. La duan mi rekomendas. Pro la Junulara Programo respondecis mi kaj neniu alia krom mi respondecas pro la fuŝaĵoj. Gravas tamen la rezultoj, kiuj, se oni kolektas ilin en unu skatolon, estas bonaj. Malgraŭ la fuŝaĵoj okazis ja grava paŝo antaŭen. Provo reveni en la movadan normalecon, ke sendepende de la aĝo ni ĉiuj kune estu sur la sama ŝipo.

Ĉio tio ne okazus sen la aktiveco de miaj junaj geamikoj, kiuj konsentis veni kaj fari ĉion eblan por ke la Junulara Programo en tiel aktiva formo realiĝu. Ĝi ne okazus ankaŭ sen helpo de UEA. Ĉi tie do specialaj dankoj al s-ro Osmo Buller, kiu akceptis la projekton kaj finance ebligis ĝian realigon, al Clay Magalhães kaj Tobiasz Kaźmierski! Dankoj necesas ankaŭ al la bjalistokanoj, kiuj organizis apud la kongresa komplekso malmultekostan amasloĝejon, kio influis multnombran alvenon de la junularo, kaj al vi, partoprenantoj de la kongreso, ĉar sen via interesiĝo la aktiveco ne havus sencon. Se mi rajtas ion konsili, ni lernu de la sperto. Sen la aktiva junularo inter ni ĉiuj ne eblas serioze pensi pri evoluo de la movado. Esperanto naskiĝis por ligi, ne dividi homojn. Kune ni havas pli da forto kunkrei la estontecon. **Irek Bobrzak**



Foto: la aŭtoro

De Bjalistoko al Havano



Foto: la Stano Marček

Dum la 94-a UK, okazanta en Bjalistoko, la Amerika Komisiono de UEA invitis kongresanojn al la kunsido de Ameriko kun la okuloj al la kariba horizonto kaj gravaj defioj por la regiona agado.

Danke al la ĉeesta kunlaboro de komisionanoj Atilio Orellana Rojas kaj Martin Schaeffer, ĉi-jare en Pollando la Amerika Komisiono partoprenis diversajn programerojn de la UK kaj aktivis ĉe la Movada Foiro per kontribuo de meksikaj kaj kubaj geesperantistoj.

Ni povis tiel informi pri la agado de la komisiono, disdoni invitilojn por partopreni la kunsidon pri Ameriko kaj informi interesitojn pri niaj estontaj planoj kaj pri la venontjara UK en Kubo.

Salutmesaĝo de Hanna Zamenhof-Zaruski

Estimataj Gesinjoroj, Geamikoj karaj,

Okaze de Zamenhof-jaro mi salutas vin, la grandan Zamenhof-familion alvenintan por kongresi en la naskiĝurbo de mia praavo. Mi ege bedaŭras, ke pro urĝaj okupoj mi ne povos havi la plezuron kune kun vi ĉeesti.

Mi anstataŭe kortuŝe rememoras la alian jubileon, okazintan ĝuste antaŭ kvindek jaroj, kiam mi mem, malgranda tiam knabineto, salutis la kongreson en Varsovio, vokante “Ho, mia kor’ ” laŭ Zamenhofa poemo...

Vi debatos dum la nuna kongreso kiel krei pacan ponton inter popoloj. Mi kredas, ke tiu paca ponto estiĝos firme starigota, kiam la nacioj de ĉiuj popoloj lernos konsideri sian apartenon al la sama vasta komunumo: la homaro. Mi ĉiam estis impresita per la Zamenhofa ideo de homaranismo; mian unuan verkon, parte aŭtobiografian, almenaŭ pollingve, mi titolis “Homarano”.

Sekve, vi, la Homaranoj kunvenintaj en Bjalistoko, ricevu tutkorajn bondezirojn de sukcesa kongreso, je la nomo de la Homaranino el Baton-Rouge en Luizjano, de Hanna Zamenhof-Zaruski.

Okazis la planita kunsido pri Ameriko, kie oni ankaŭ informis pri la projekto okazigi trejnseminarion venontjare en Kubo lige kun la 95 UK; pri la projekto *Esperanto al Ameriko*, celanta flugigi instruiston al la centramerika regiono kaj laste al Kubo.

Estis prezentita ankaŭ nova varbilo eldonita unue por Meksiko kaj due por Kubo per kunlaboro inter la komisiono kaj Germana Esperanto-Asocio; temas pri varbilo kiu indas je pli vasta eldonado por hispanparolantaj landoj kun adaptioj rilate kontakttinformojn.

Ni partoprenis la kunsidon de Regiona Agado, kunordigitan de Hori Yasuo, estrarano pri landa kaj regiona agado, kaj plifirmigis interpersonajn rilatojn kun komitatanoj kaj aliaj aktivuloj movadaj el diversaj mondopartoj, kio konsistigas esencan bazon por daŭre prezenti kaj sentigi la aktivemon de nia komisiono.

Rimarkinda punkto rilatis al partopreno kaj/aŭ reprezentiĝo de nia komisiono en la plej gravaj internaciaj eventoj, pro la sekvoj de ĉeestaj kontaktoj en la laboro.

Sentiĝis ankaŭ gravaj forestoj de landaj reprezentantoj. Ĝuste tial ni daŭre invitas, laŭeble, la landajn asociojn de la regiono, pli vigle partopreni aŭ reprezentiĝi en internaciaj eventoj aŭ sendi raportojn diskonigeblajn kadre de tiuspecaj renkontiĝoj.

Ni konscias ke la komisiono devas pli kaj pli serĉi manierojn sentigi sin, allogi la atenton de la amerikaj esperantistoj, varbi por konkretaj celoj edukaj, informaj kaj trejnaj. Nia retejo www.ameriko.org klopodas pli kaj pli kreski kaj informi pri niaj agoj kaj planoj.

Grava defio estas, sendube, agadi por sukceso de la internaciaj eventoj de la venonta jaro, okazontaj en tiu ĉi mondoparto, kaj diversmaniere kontribui jen en sociaj forumoj, jen naciaj kongresoj kaj la 95-a UK, la 66-a IJK kaj la 43-a ILEI-konferenco, kiujn gastigos en Kubo.

Nia komisiono laboros por ebligi partoprenon de nemalhaveblaj gesamideanoj, aparte el la mezamerika regiono, en la UK de 2010, por kio ni invitas vin sendi monkontribuojn al Fondaĵo Ameriko. Temas pri unika ŝanco kaj estas nia espero instigi kaj kontribui al tutamerik-etosa UK.

Kontribuoj bonvenas ankaŭ por *Esperanto al Ameriko*, do, se vi emas mondonaci, indiku klare vian celon. Pliaj informoj troveblas en nia retpaĝo.

Maritza Gutiérrez González

Kunordiganto, Amerika Komisiono de UEA



Inaŭgura parolado de la Prezidanto

Estimataj honoraj gastoj, estimataj gekolegoj, sinjorinoj kaj sinjoroj:

Universala Esperanto-Asocio ĉi-jare observas la centkvindekjaran naskiĝdatrevenon de Lazaro Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de nia lingvo, en lia naskiĝurbo Bjalistoko. Bonvenon al tiu ĉi jubilea kongreso! Jubileante, ni kompreneble volas jubili, kaj ni efektive havas bonajn kialojn por esti iom kontentaj. Sufiĉas pensi pri feliĉoj lastatempaj – pensi pri favora rezolucio en la parlamento de tiu ĉi gastama lando, Pollando, pensi pri ekfunkciinta Esperanto-ekzamena sistemo bazita sur la Komuna Eŭropa Referenckadro, pensi pri intensiĝantaj kontaktoj kun Unesko, se menciis nur kelkajn ekzemplojn de pozitivajoj. Plej freŝdate, nia asocio ricevis de Eva Egron-Polak, ĝenerala sekretario kaj administra direktoro de la Internacia Asocio de Universitatoj, Unesko, Parizo, salutmesaĝon al ĉi tiu kongreso!

Alia lastatempa scienca pozitivajo estas la apero, ĉe Flandra Esperanto-Ligo, de *La origino de la specioj*, esperantigo de la klasika scienca verko de Charles Darwin, aperinta ĝuste en 1809, la naskiĝjaro de Zamenhof. La libro enviciĝas en Scienca Penso, nova libroserio paralela al la beletra serio Oriento-Okcidento. Festante unu jubileon, “nia” facila vento flugas ankaŭ al aliaj jubileoj.

Ni esperantistoj jam dekomence kunagas kun aliaj movadoj strebantaj por justa, sendiskriminacia, digna mondo, interalie kun la klopodadoj por plidignigi la vivon de la blinduloj kaj aliaj handikapitoj. Pioniran rolon ludis sur tiu tereno la inventinto de la brajla skribosistemo por blinduloj. Tiu inventinto, Louis Braille/ Ludoviko Brajlo, naskiĝis en 1859, kvindek jarojn pli frue ol Zamenhof. Pasintmonate, en lingvistika labortendaro, kie mi reprezentis UEA, ni ekkonstruis konvertilojn inter la unikodaj kaj brajlaj kodigoj por la sudaziaj lingvoj, kaj tie oni reliefe menciis la festadon de la ducentjara jubileo de Ludoviko Brajlo. La fakto, ke tiu ĉi nia jubilea kongreso donas okazon por rememori ankaŭ Ludovikon Brajlo, pere de tiutema IKU-prelego de Otto Prytz en jaŭdo, rolas nur pliprofundi nian omaĝon al nia jubileato Ludoviko Zamenhof.

Alidirekte, do kvindek jarojn pli malfrue ol Zamenhof, naskiĝis granda korifeo de Esperantujo, profesoro d-ro Ivo Lapenna, kiu arkitektis la modernan Esperanto-movadon. Nia festado pri lia centjariĝo pintos en la datrevena monato novembro. Sed jam nun estas bona ideo konatiĝi – aŭ, se vi estas veterano, rekonatiĝi – kun liaj majestaj atingoj. Mi estas feliĉa povi diri, ke dum kongresa programero hodiaŭ posttagmeze, vi havos la okazon konatiĝi iugrade kun la atingoj de tiu nia granda arkitekto. Mi reliefigu ankaŭ la Szerdahelyi-simpozion, kiu okazos en lundo. Szerdahelyi estis korifeo de la esperantologio.

Tio ne elĉerpas la jubilean liston, mi devas diri. El nia lingvo en tiu epoko disradiis la aparta energio de juneco. En 1909 la unua Esperanta poetino Marie Hankel premiĝis en la Universala Kongreso en Barcelono. Ĵus mi aŭdis la novaĵon, ke germanaj esperantistoj okazigos en decembro, post 80 jaroj de la morto de Marie Hankel, Dresdenajn Marie-Hankel-Kulturtagojn. La urbestro estos la

oficiala protektanto de tiu evento. En 1909 fondiĝis la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. En 1909 aperis el la plumo de Emile Boirac la *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanta-franca*, kiu kunfluigis la leksikografiajn entreprenojn de la diversaj landoj. Mi certas, ke ĉi-kongrese la aŭtoroj, la fervojistoj, la vortaristoj, la stafetportantoj de Barcelono kaj diversaj aliaj specifaj posteularoj laboros kun ni ĉiuj por ke ni lernu meriti la heredaĵaron, kiun la historio lavangas sur nin en la jubilea jaro. Dum la babiloj de niaj improvizaj komune manĝantaj kaj trinkantaj sesopoj, dekopoj, dek-ses-regulopoj, kiuj regule konsistigas la veran akson de ĉiu Esperanta kongreso, ni malpeze informu unu la alian pri ĉi tiaj mejloŝtonoj. Oni ne perdu la okazon rememori, ke en 1989 falis iuj el la forte starantaj muroj de mil jaroj, kaj ke al tiu faligo grave kontribuis Pollando.



Tamen nian memoron ĝuste pri Zamenhof ni povas aparte taŭge prikonscii en Bjalistoko. Ni danku Aleksandron Korĵenkov pro la tute ĝustatempa libro pri li, kaj dume ni en niaj propraj psikoj fasonu, ĉiu el ni, tute personan omaĝon. En tiu persona dialogado kun lia unika personeco, ni ne povas permesi al ni redukti Zamenhofon al la lingva dimensio. Li estis ne nur lingvofaranto, sed, kiel emfazis Humphrey Tonkin en sia ĉi-matena prezento, Zamenhof volis elpaŝi ankaŭ kiel pioniro sur la tereno de la religia dialogo inter la popoloj. Tiu tereno fariĝis hodiaŭ aparte aktuala, kaj estas do sence meti flanken la idearon de la homaranismo, kiam ni pensas pri Zamenhof.

Mi prezidas neŭtralan asocion kaj certe ne staras ĉi-podie por prezenti starpunkton por aŭ kontraŭ la homaranismo kiel specifa doktrino. Sed multaj el ni konas la metodologiajn ideojn de skemismo (kiel en Volapük) kaj naturalismo (kiel ĉe Interlingua), ideojn ofte uzatajn por pli bone kompreni la dinamikon de lingvaj tendencoj en Esperanto mem. Mi kuraĝas prezenti al vi por konsidero novan ideon mian – nome, ke ni rigardu la homaranismon, formale, kiel *skemisman* proponon, kiun ni komparu kun la pli ofte prezentataj *naturalismaj* alternativoj en la sfero de la interkultura kaj interreligia dialogo.

La sperto de la lingvo Esperanto montras bezonon de dialoga rilato inter la skemismo kaj la naturalismo. Ankaŭ en la kultura kaj religia dialogado, ni lernas uzi la kreajn rimedojn, kiujn fasonis la genia Zamenhof. Esperanto estas rimeda lingvo, kies aplikojn, ankaŭ ekster la pure lingva sfero, oni ankoraŭ ne komencis sufiĉe vaste pripensi. En tiu senco, la ideo Esperanto restas juna – juna rimedo por la infana raso, la homaro, komencanta konatiĝi kun sia kapablo por la paco.

Por forĝi el nia historia kaj aktuala ŝtofo indan daŭrigon de la riĉa teksaĵo, kiun ni heredas, nia kongresanaro entuziasme laboros kun Humphrey Tonkin, la reĝisoro de la kongresa temo. Ni ĉi-matene aŭdis de li kiamaniere li kaj lia kunreĝisoro Marc Bavant malpakas la kongresteman laboron en konkretajn sesiojn.

Antaŭ ol fini, mi deziras altiri vian atenton al la salutmesaĝo de alia parenco de pola esperantista veterano, kiun vi ne rimarkus sen mia atentigo. La nepo de Kabe, de Kazimierz Bein, envenis en la Kongreson, ridetis, kaj foriris, por demonstre instrui al ni la verbon donacitan al Esperanto de Pollando, la verbon kabei. Agrablan kongresadon!

István Szerdahelyi: vivo, verko kaj heredaĵo

Post prelego rememoranta la iaman prezidanton en la ILEI-konferenco, okazis en la UK simpozio (sub la aŭspicio de AdE kaj CED) omaĝe al prof. István Szerdahelyi (1924-1987): novema lingvisto, preciza interlingvisto, elstara pedagogo, leksikografo kaj fondinto de la Esperanto-fako de la budapeŝta Universitato Eötvös (ELTE).

Prezentis lin, kaj lanĉis la libron *Abunda fonto* dediĉitan al li, Ilona Koutny, lia iama studentino kaj posteulo en ELTE dum jardeko.

Iamaj gestudentoj kaj kolegoj traktis liajn daŭre aktualajn temojn: Probal Dasgupta analizis la morfeman sistemon de Esperanto; Renato Corsetti la propedeŭtikan valoron de Esperanto. Zsófia Kóródy prezentis la rolon de Esperanto kadre de instruado de fremdaj lingvoj; István Ertl specifajn aspektojn de tradukado el kaj al Esperanto. La specifajojn de la Esperanta leksikografio skizis Ilona Koutny, kiu gvidis la programon.



En Budapeŝto sekvis tuttaga memorfesto dediĉita al prof. Szerdahelyi la 30-an de aŭgusto, kun partopreno de lia familio (la edzino, du filoj, 5 nepoj). Enkondukis la festadon Imre Szabó, prezidanto de HEA: rememorigis pri la meritoj de Szerdahelyi la nova ILEI-prezidanto, Stefan MacGill, kaj salutis Zlatko Tišlar, kiu poste prezentis filmitan intervjuon kun la festato.

Post la prezento de la vivo kaj verko de prof. Szerdahelyi fare de Ilona Koutny, kaj transdono de la memrolibro, prelegis iamaj hungaraj kolegoj kaj studentoj: Blazio Vaha, Árpád Rátkai, György Nanovszky, Márta Kovács, Zsófia Kóródy kaj István Ertl. Kvankam lia granda atingo, la E-fako de ELTE, finis sian agadon, liaj gestudentoj plu agas kaj lia vivoverko estas ankaŭ nun aktuala.

I.K.

UEA premiis, diplomis kaj subvenciis

En la Solena Fermo de la 94-a UK oni laŭtradicie anoncis premiojn, diplomojn kaj subvenciojn laŭ la decido de la Estraro de UEA.

Aparte prestiĝa distingo de UEA estas la **Premio Onisaburo Deguĉi**, la “esperantista pacpremio”. Per ĝi oni premias agadon, kiu elstare kontribuis al paco kaj internacia amikeco en la spirito de Onisaburo Deguĉi kaj L.L. Zamenhof. Ĝi estis starigita per donaco de Oomoto kaj unuafoje aljuĝita en 1987. La Premion de la jaro 2009, konsistanta el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj, ricevis

la muzika eldonejo Vinilkosmo,

fondita de Floréal Martorell. En 1988 li fondis la asocion EUROKKA kaj en 1990 la eldonejon Vinilkosmo kaj la revuon *Rok-gazet*. Vinilkosmo eldonis amason da diskoj, kiuj grave kontribuis al la Esperanta muzika kulturo kaj al la plifortigo de interkultura dialogo.

Ekde 2007 la Estraro rajtas asigni **Diplomon pri Elstara Agado**, kiun individuo aŭ organizaĵo povas gajni ne nur pro

longtempa agado sur pluraj movadaj kampoj, sed ankaŭ pro escepte elstara kaj ekzemplodona agado sur unu kampo aŭ pri unu projekto. Ĉi-jare estis diplomita Svetislav Kanaĉki el Aŭstralio, pro sia pli ol 20-jara agado kiel redaktoro de la Esperantaj elsendoj de 3ZZZ, loka multetna radiostacio en Melburno, kiu jam ekde 2000 estas aŭdebla ankaŭ tutmonde per Interreto.

Subvencio Cigno estas monsubvencio, starigita per donaco de la japana esperantisto Miyoshi Etsuo. La Estraro de UEA aljuĝas ĝin al Esperanta organizaĵo en la Tria Mondo aŭ iu el la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo por agado, kiu antaŭenigas la Esperantan movadon aŭ ĝian kulturon. La subvencio valoras 500 000 japanajn enojn (ĉ. 3 800 eŭroj). Ĉi-jare ĝin ricevis

Fondumo Zamenhof en Bjalistoko.

Dum la 94-a UK oni povis atesti la realiĝon de la Centro Zamenhof en la naskiĝurbo de Zamenhof, kiu rezultis el multjara klopodado de Fondumo Zamenhof. Per la Subvencio Cigno la Estraro de UEA rekonis tiun atingon, dezirante samtempe konkrete subteni la estontan funkciadon de la nova Centro.



Lertaj manoj kaj fortaj brakoj dum plurkilometra kajakado



Pretiĝo por merkreda ekskurso kune kun kelkaj gepatroj



La kurson de la dua nivelo gvidis Elena el la rusa urbo Ĉeboksari



Ĉiuj subskribas grandan tukon por peti pacon en la mondo



Diskoteko post kunigaj rondodancoj gvidataj de Lidka el Góra



Komuna foto antaŭ la Zamenhof-statuo en Bjalistoko



Granda Kazino, ludoj gvidataj de Matthias al Belgio



Fina adiaŭo post la Fermo, oni certe revidos sin en iu sekva jaro

Kvindoko da partoprenantoj: 37 infanoj 6-ĝis 17-jaraj (24 knabinoj kaj 13 knaboj), 10 gvidantoj kaj helpantoj el 16 landoj kaj 4 kontinentoj.

Per amo, amikeco kaj solidareco la movado plifortiĝu en la tuta mondo

Kiam mi fariĝis estrarano en 2007, mi elektis la fakon pri landa kaj regiona agadoj, ĉar mi jam estis respondeca pri Azio dum la pasintaj 7 jaroj, kaj la aliaj fakoj estas tute fremdaj por mi, sed esti la estrarano respondeca pri tiu fako estas tre malfacile por mi, ĉar la mondo estas tro granda kaj por unusola homo estas neeble prizorgi ĉiujn. Kompare kun la prezidento de Usono, kiu havas multegajn stabanojn kaj eĉ la armeon por la internacia afero, kion mi havas?



1. Kernaj 5 regionaj komisionoj

UEA havas kvin regionajn komisionojn: Afrika, Amerika, Azia (Komisiono pri Azia Esperanto-movado = KAEM), Mez-Oriento kaj Norda Afriko, kaj Oceanio. En Afriko estas ankaŭ Afrika Oficejo, kiu laboras kun la Afrika Komisiono. Nun en multaj afrikaj landoj naskiĝis Esperanto-movado dank' al grandaj helpoj el Eŭropo. La lastan jaron okazis ILEI-konferenco en Benino, kaj tio akcelas la movadan paŝadon. Multaj esperantistoj volas partopreni en kongresoj kaj renkontiĝoj ekster Afriko, sed malhelpas ilin la vizo-problemo. En la 94-a UK neniuj el Afriko povis partopreni krom kelkaj, kiuj loĝas ekstere. Iliaj parolkapablo kaj entuziasmo pri Esperanto estas tre grandaj, do tiu baro estas tre bedaŭrinda afero.

La Amerika Komisiono sukcesigis la 7-an Tutamerikan Kongreson lastan jaron en Kanado, kaj multe laboras por semi kaj vigligi la movadon en Meza kaj Suda Ameriko.

Azio havas eble la plej vigan movadon. En la 94-a UK Mongolio membriĝis al UEA, kaj nun estas 11 landaj asocioj en tiu kontinento. La organo de KAEM *Esperanto en Azio* eldoniĝas kvarfoje jare kaj atingas 350 esperantistojn en la progresantaj landoj kaj 150 japanajn kaj koreajn mondonacintojn al Fondaĵo Azio. En junio 2010 okazos la 6-a Azia Kongreso en Mongolio, kaj oni atendas pli ol 300 partoprenantojn.

Mez-Oriento kaj Norda Afriko estas tre malfacilaj regionoj pro religiaj aferoj, ekzemple pro la juda deveno de Zamenhof, sed la lastan jaron sukcesis la unua Mez-Orienta Renkontiĝo en Amano, Jordanio, kaj plu oni laboras por la tria renkontiĝo en Iznik, Turkio.

En Oceanio laboras trikapla komisiono. Ĝia ĉefa intereso estas sur Kaledonio (franca gubernio) kaj Indonezio. En Kaledonio naskiĝis kaj komencis aktive agadi Esperanto-klubo. Pri Indonezio jam multajn jarojn Aŭstralio helpis la movadon kaj nun ankaŭ KAEM. Estas multaj insulaj landoj en Oceanio, sed tiujn la komisiono ankoraŭ ne povas influi.

2. Eŭropo devas esti forta

Ne ekzistas eŭropa komisiono. Mi supozas, ke la supraj komisionoj estis fonditaj por vigligi kaj subteni la movadojn en malfortaj regionoj. Laŭ tiu vidpunkto ŝajne eŭropa komisiono ne necesas, tamen ĉu tiu opinio estas prava? Por movado ni unue devas kolekti informojn, due

analizi la situacion laŭ tiuj informoj, trie starigi laborplanojn kaj fine plenumi tiujn. Tamen pri Eŭropo bazaj informoj mankas. Pri aliaj regionoj mi petas la komisionestrojn raporti pri sia regiono, kaj tuj revenas respondoj, kaj mi povas scii la situaciojn, sed pri Eŭropo neniuj kolektas informojn, do neniuj analizo, neniuj laborplano, neniuj plenumo.

Alia argumento estas, ĉu eŭropa movado estas forta? Ja estas kelkaj fortaj landoj, sed multaj estas ne tiel fortaj. Raporto de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio) mencias du landojn, Grekion kaj Portugalion, kiuj "apenaŭ donas signon de la vivo". En la iamaj socialismaj landoj la Esperanto-movado perdis la subtenon de la ŝtato post la falo de la Berlina Muro,

kaj dume multaj movadoj malfortiĝis. Estas necese al eŭropaj landoj entute aŭ grupe kunlabori por plivigligo de la movado.

Renato Corsetti ofte diras: "Esperanto havas pli da ŝancoj en Azio ol en Eŭropo" (el lia saluto al la 91-a Japano Kongreso 2004), sed esperantistoj ekster Eŭropo plejcerte malsame opinias. Ja estas bone, ke Azio havas ŝancojn, sed plej bezonate estas, ke Eŭropo havu pli da ŝancoj kaj Esperanto floru plej bele tie. Esperanto naskiĝis en Eŭropo, do la origino devas esti la plej forta. Laŭ tiu opinio s-ro Miyoshi Etsuo daŭrigas mondonacojn por la propagando de Esperanto en ĉefaj ĵurnaloj en Eŭropo.

3. Fruktoj de novaj kunsidoj en la 94-a UK

Ĉar alie mi estus senkapabla, mi devas dependi de la komisionoj kaj eŭropaj esperantistoj. Opinianta tiel, mi organizis du novajn kunsidojn en la 94-a UK: Regiona Agado kaj Eŭropa Agado. En la unua mi volis, ke ĉiuj respondeculoj konu la aliajn regionojn kaj interŝanĝu spertojn. Unuan fojon ili renkontiĝis kaj aŭskultis raportojn de aliaj regionoj, do la kunsido estis fruktodona.

En la dua kunsido, unue mi esprimis mian ideon pri Eŭropo kaj due s-ino Mireille Grosjean pri geografia afero. Poste s-ro Seán Ó Rian, la prezidanto de EEU, raportis pri siaj agadoj. Laŭ lia raporto EEU multe laboras ne nur politike en la kadro de EU, sed ankaŭ loka por siaj membraj landoj. Ĉar la laborforto en Eŭropo estas limigita kaj estos malfacile kaj eble ne efike starigi Eŭropan Komisionon kiel duoblan tegmenton, mi esprimis mian volon, ke EEU havu pli da konscio pri la tuta Eŭropo kaj, se eblas, laboru por ĝi. Kiel komitata rekomendo estis aprobita jena frazo "Estas nepre dezirinde, ke EEU prizorgu kaj raportu pri ĉiuj eŭropaj landoj, prefere pere de teamoj de najbaraj landoj por faciligi la realigon de komunaj projektoj".

Dum la UK, precipe en la kunsidoj de regionaj agadoj, mi renkontis multajn aktivulojn kaj tio donis al mi pli da energio. Kompare kun la usona prezidento Obama, mi havas nur malmultajn kunlaborantojn, sed ni estas forte ligitaj per amo, amikeco kaj solidareco, kaj tio certe estas pli forta ol la stabanaro de Obama.

Hori Jasuo

estrarano pri landa kaj regiona agadoj

42-a Konferenco de ILEI: Turnopunkta evento en Krakovo

Pli ol okdek partoprenantoj el 28 landoj kuniĝis mezjule en tiu renoma pola urbo. La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo liveris bone ekipitan modernan konferencejon (www.wszib.edu.pl).

Gia direktoro, Prof. Włodzimierz Roszczyniański, bonvenigis la konferencanojn, parolante en Esperanto, deklarante sian scion kaj aprezon de la lingvo pro partopreno en E-aranĝo en Gyula (Hungario) en 1963. La konferenco ricevis saluton de la Alta Protektanto, s-ino Katarzyna Hall, la ministro de Nacia Klerigado de Pollando, kiu inkluzivis la frazon: *Tiu ĉi lingvo ludas gravan rolon en la mondo, ĉar unu el la sekvoj de la ideo de Ludoviko Zamenhof estas edukado por la kulturo de paco, senperforta solvado de konfliktoj kaj disvastigado de sintenoj eliminantaj antaŭjuĝojn kaj stereotipojn*. Tio referencas al la konferenca temo *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado*. Tiun temon refrenis la tiama prezidanto de ILEI, Radojica Petrović, kiu komencis sian inaŭguran prelegon jene: *Per la 42-a konferenco de ILEI ni notas la 60-jariĝon de nia organizo kaj omaĝas la 150-an naskiĝdatrevenon de Zamenhof, ligante la du jubileojn al la pasintjara sesdekjariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*. Ĉi tiu simbole grava koincido de la datrevenoj emfazas la packulturan agadon de ILEI por kaj per la Internacia Lingvo de D-ro Zamenhof subtene al la homaj rajtoj, precipe en la sferoj de kulturo, edukado kaj komunikado. Ni kontribuas niajn kolonojn kaj nian pavimon al konstruado de pacaj pontoj inter la popoloj, apogante nian



laboron sur la pedagogiaj kaj etikaj valoroj de Esperanto. Nia agadkampo estas la pedagogio de Esperanto. Kaj tiu pedagogio dum la tuta historio de Esperanto, des pli dum la historio de ILEI, estas interkultura pedagogio. La ĝenerala sekretario de UEA Barbara Pietrzak partoprenis la konferencon kaj legis saluton de Claude Nourmont, vicprezidanto de UEA kaj ĝia estrarano pri kulturo kaj edukado.

Kial la konferenco estis turno-punkta? Laŭ amplekso, aŭdaco kaj kontaktado kun ne-konferencanoj, la programo estis senprecedence riĉa. Kiel komentis Duncan Charters, la nova vic-prezidanto de ILEI, en persona pritakso en numero 2009/3 de *Internacia Pedagogia Revuo*: *Mi ekkonsciis kiom profesiigis la konferenca aranĝado en la lastaj jaroj malgraŭ tio, ke la tuto dependas de volontula laboro*. La konferencon pretigis s-ino Aida Ĉizikaitė flanke de ILEI kune kun loka teamo sub la gvido de LKK-prezidanto Małgosia Komarnicka. En la daŭro de ses tagoj okazis 158 unuopaj prezentaĵoj. Du pliaj jubileoj estis markitaj per festparoloj: 85 jaroj pasis

de la naskiĝo de István Szerdahelyi (prezidanto de ILEI 1985-87); lin omaĝis Ilona Koutny (PL) pere de ĵus aperigita memorlibro. Josip Pleadin (HR) prinotis la centjaran memordaton de Ivo Lapenna, konstruinto de la moderna Esperanto-movado.

Inter la ceteraj prelegoj kaj seminarioj, aranĝitaj paralele en tri klasĉambroj estis *La rolo de la nuntempa teknologio en la lingvoakirado* (6-foje) de Duncan Charters (US); *E-literaturo* (6-foje) de Lidia Ligęza (PL); *Rolludoj* (2-foje) de Stefan MacGill (HU); *Lingvaj ludoj* (3-foje) de Ana Montesinos de Gomis (GB); *Interkultura komunikado* (3-foje) de Kristin Tytgat (BE); *Esperanto laŭ rekta metodo* (2-foje) de Stano Marček (SK), kaj prezento de la ĵus okazinta ILEI-



Fotoj: Sjoerd Bosga

seminario en Kinŝaso de Radojica Petrović (RS). La lokuloj gvidis sesiojn pri la polaj kulturo kaj lingvo. Pri la longa historio de Pollando gastprelegis Hans-Dietrich Quednau, kiu krome kaj unuafoje gvidis tutan AIS-sesion kadre de la konferenco. Diskutroondojn gvidis Mihail Lineckij (UA) pri ludoj, kaj pri strategio por vera “neŭtrala” multlingvismo gvidis Michael Cwik (BE).

Tuttaga ampleksa simpozio okazis jam la 5-an fojon gvidata de Witold Stepniewski kaj Ilona Koutny. Ĉefprelegon *Eduksistemo en Pollando* faris Tomasz Malicki (PL). Kunvenis sciencistoj (inkluzive de neesperantistoj) el 11 universitatoj el Pollando, Italio, Japanio, Ukrainio kaj Usono; estis faritaj 18 prelegoj. La simpozio finiĝis per vigla paneldiskuto pri la prelegoj kaj la konferenca temo. Dua renkontiĝo de universitataj instruistoj daŭrigis la pasintjarajn diskutojn en Amsterdamo pri la instruado de Esperanto kaj interlingvistiko sur universitata nivelo, kun specifa atento al projektoj, kunlaborado kaj interŝanĝoj. Ĝin gvidis Renato Corsetti (IT).

Publike malfermitan Lingvan Festivalon organizis la spertulo Dennis Keefe (US), kune kun koncerto. La ĉeestantoj povis ekscii pri kaj lerneti diversajn lingvojn inkluzive Esperanton. Fine, en la urbocentra kulturdomo Maria Majerczak organizis similan *Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj*, profitante la partoprenon de konferencanoj, kun prelego de loka universitata spertulo pri la pola kulturo en la tempo de Zamenhof, kaj fine vigla kaj partopreniga multlingva koncerto de JoMo. Ankaŭ tie aperis publiko interesita pri lingvoj, Esperanto – kaj muziko.

La moto de la konferenco estis *amuzo kaj scienco*. Ankaŭ la distra parto buntis, kun interesaj vesperaj programoj (i.a. monodramo de Jadwiga Giebczyńska laŭ la taglibro de Ada Sikorska-Fighiera) kaj ampleksa programo de ekskursoj: tuttaga al Zakopane kaj Wadowice, kaj plia al Kalwaria kaj Oświęcim, ankaŭ tri duontagaj: al salminejo Wieliczka, Niepołomice kaj piede tra Krakovo. La ekskursojn gvidis Lidia Ligęza, Piotr Nosek, Magdalena Tatara kaj Gosia Nitkowska. Bedaŭrinde, tia UK-stila aliro kun ĉiutaga ekskursado grave kompromitis la fakan programon kaj sukcesintus nur en konferenco kun kelkcento da partoprenantoj. Duncan Charters denove: *Aparte elstaris [la ekskursoferto] por konferencanoj kiuj deziris profiti samtempe ferii kaj edukiĝi pri novaj regiono kaj kulturo, kvankam la allogo de la ekskursata programo signifis ke foje, kaj aparte dum unu tago, la konferenca programo mem apenaŭ altiris ĉeestantojn. Ĉiam malfacila dilemo, oferti abundajn elektojn kiuj tamen permesas subteni ĉiujn programerojn. [Gravas ne] forpreni publikon de vere esencaj temoj kiuj estas efike trakteblaj nur en plena konferenca sesio kaj aldonita persona noto: Tiel abundis la elektoj, ke grava problemo por kelkaj estis konfliktoj inter programeroj. Ekzemple, mi ne povis ĉeesti la trian seminarion pri interkultura komunikado ĉar ĝi okazis samtempe kun unu el miaj seminarioj pri teknologio, kaj ankaŭ kun kunsido de la Komitato de ILEI!*

Ĝuste tie elektiĝis nova estraro de ILEI por 2009-2012; plia turnopunkto, ĉar nur du el la antaŭaj estraranoj restis: la antaŭa prezidanto plue prizorgos (kun pli da disponebla

tempo) siajn fakojn de Interkulturo kaj Afrika agado, kaj Zsófia Kóródy pri ekzamenoj kaj instrucentroj. Novaj estas la prezidanto Stefan MacGill (kunordigo, eksteraj rilatoj), la tamen alveninta vicprezidanto Duncan Charters (Usono, universitata agado), Małgosia Komarnicka (Pollando, sekretario), Julija Batrakova (Nederlando, kasisto), Julián Hernández (Kubo, landa kaj lerneja agado), kun posta aldono de komisiito pri la kuba konferenco Ana Montesinos de Gomis (Britio).

La komitato interalie akceptis ekzamenan regularon por blinduloj (kiun la komitato de UEA akceptis semajnon poste), aprobis celaron por 2009-2012, akceptis skizitan buĝeton por 2010 kaj starigis novan komisionon pri universitata agado. La estraro kunsidos en Hago fine de novembro, koincide kun la Malferma Tago de UEA en Roterdamo, kie ILEI prezentiĝos. En Hago la estraro akceptos laborplanon por la tri-jara periodo, kiu diferencos de antaŭaj planoj en tio, ke ĝi estos ne nur celaro, sed listigos kompletige projektojn por plenumi la celojn, kun projekt-estroj, plenumantoj kaj liverodatoj. La liga retejo www.ilei.info estas ĝisdatigata po kelktage kaj informas pri la plej lastaj iniciatoj.

Ni jam antaŭenrigardas al la sekva konferenco, okazonta en la semajno antaŭ la UK en la kuba urbo Matanzas, 90 km nordoriente de Havano. Tie la programo havos ne du sed tri pilierojn: al amuzo kaj scienco aldoniĝas laboro. Nome, ni starigos serion da laborgrupoj kaj taskoj kune plenumendaj tra la konferencaj tagoj. La talentoriĉo kaj ebla laborintenseco ĉe fizike kunigitaj membroj tro valoras por preteratenti. Ni zorgos ke la distra, faka kaj labora fadenoj bone kunekzistu sen lezi unu la alian. Ni ĉiutage kadre de la faka aŭ labora programo kunigos ĉiujn konferencanojn, ekzemple por forumo aŭ paneldiskuto. La tuta konferenco kun ĉiuj servoj okazos en unu hotelo (kun klimatizo kaj naĝ-baseno – ne luksaĵoj en la kuba somero), tiel ke ankaŭ konvenaj ejoj estos je dispono por neformala konversaciado. Tiuj el ni de certa aĝo memoras ankoraŭ la konferencon en Hanabaniĉa en 1990 – tre produktivan, intiman kaj bonetosan. Ni strebos rekrei tiujn kvalitojn en nia sekva konferenco, por ke ĝi estu inda postsekvanto – kiom ajn malsimila – al nia memorinda jubilea kunestado en Krakovo.

Stefan MacGill,
prezidanto de ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI



ILEI estas la ĉefa kolektiĝejo por instruistoj kaj edukistoj de Esperanto. Ĝi estas aliĝinta faka asocio de UEA kaj havas sekciojn en pli ol 30 landoj kaj membrojn en pli ol 45. La organizo laboras i.a. pri instruado de Esperanto en lernejoj kaj universitatoj, okazigas ekzamenojn kiuj testas lingvajn kaj kulturajn sciojn pri Esperanto. Hejmpaĝo: www.ilei.info. Membrigi al ILEI: <http://www.ilei.info/membrigxo.php?lingvo=eo>

Zamenhof-jaro 2009: L.L. Zamenhof kaj Palestino

En 1881, ses jarojn antaŭ la apero de Esperanto, oni murdas caron Aleksandro II, kaj tuj ekaperas la multkapa monstro: pogromaro en la tuta Imperio, interalie en Bjalistoko kaj Varsovio.¹

Sekve Zamenhof komence de 1882 ruse verkas por la juda Peterburga kulturgazeto *Razsvet* (*Tagiĝo*) unuan artikolon, tipe Zamenhofeskan pro sia ekvilibro inter rigora racieco kaj kortuŝa emocio: “Kion do finfine fari?”² Zamenhof dividas sian tekston en kvin partojn. En la unua li klarigas la sopiron de la juda popolo al propra patrujo, kie ĝi ne plu estus “ŝutata de insultoj kaj malbenoj” (citaĵoj tradukitaj el la rusa originalo), kie ĝi ne plu bezonus manĝi “viandon en Egiptaj potoj” (Biblia aludo al La Eliro). Nepre necesas ŝanĝo de la situacio post la apero de la “plumba nubo de malfeliĉo”.

La dua parto celas demonstri, ke asimiliĝo de judoj, t.e. kunfandiĝo kun aliaj popoloj, tute ne eblas “malgraŭ la opinio de kelkaj judoj”. Tri interesaj Zamenhofaj konsideroj aperas en tiu parto. Unue lia granda ideo, ke du elementoj faras popolon: komuna lingvo, komuna religio. Li due rimarkigas, ke en antikva tempo romianoj, pro sia multedia religio, estis pli toleremaj ol la nunaj homoj, ĉar ili estis pretaj aldoni aliajn diojn al siaj propraj.

Li trie klarigas la civitanleĝajn konceptojn tiam en uzo en la Rusa Imperio. Ili estis tute fremdaj de tiuj de Homaj Rajtoj starigitaj de la Franca Revolucio, laŭ kiuj ĉiuj homoj estas leĝe egalaj. Laŭ tiu ĉi lasta konceptaro, religio kaj genta deveno tute ne influas sur la civitana rajtaro. Di-kredo, politika opinio, sindikata aparteno, landa deveno estas simple privataj aferoj. Se Zamenhof estus akceptinta la proponon de Javal veni vivi en Francujon³ li estus post tempo akirinta la francan naciecon, kun la plenaj rajtoj de franco, kies religio kaj origino estas leĝe indiferentaj. Sed en la Rusa Imperio, kie li vivis, li povis diri: “ni povas esti nur civitanoj de Rusujo [...] sed ne rusoj [...]”. Judeco aŭtomate tiam pelis judojn en malsupran nivelon, ekster la resto de l’ enloĝantoj. Ekzemple unu filo de Freud, mobilizita en la aŭstra armeo en 1914, ŝerce skribis al sia patro, ke li tiel havos la okazon “... eniri Rusujon sen ŝanĝi religion”⁴ tiel aludante la neeblojn por fremda judo eniri tiun landon.

En la parto tria de sia teksto, Zamenhof konsideras la solan saveblon: elmigri. Sed kien?

Ĉu Ameriko aŭ Palestino?

Tiam ekzistis du partioj en la Judaro⁵: la al-Amerika, kaj la al-Palestina. Zamenhof klare elektas la unuan, apogante sin sur estontaj politika kaj ekonomia situacioj multe pli facilaj en Ameriko. Male ĉu la antikva Hebrea loĝado en Palestino pravigus nunan revenon tien? Ĉu “...Jankioj sentas nepron reveni Anglujojn? Vi trovus tre komike, se Eŭropaj popoloj nomus sin malfeliĉaj, ĉar ili nun ne vivas tie, kie antaŭ kelkaj jarmiloj vivis iliaj prauloj...” “Palestinanoj” (en lia tiama diro tio kompreneble signifas: al-Palestinemuloj) estas “ekzaltiĝemaj...”.

En sia parto kvara, Zamenhof asertas, ke Palestina aliro kreos amason da religiaj kaj sociaj problemoj. En parto kvina, la lasta, li insistas, ke Amerika “elmigrada fonduso post rapida kreskado [...] povos peti proklami sian teritorion ŝtato kaj enkorpiĝi en Nordamerikan Konfederacion”.

Li konkludas, ke la bona solvo estas elmigri al Ameriko, kaj li finas per la alvoko: “Ĝis revido [...] sur liberaj bordoj de Misisipo!”

Refari historion ne havas sencon; tamen ĉiu rajtas reve imagi la nunan mondon kun la nunaj Hebreoj trankvilaj sur la bordoj de Misisipo, kiel Mormonoj en Utaho...

Sed subite, apenaŭ unu-du monatojn poste, en Marto, jen Zamenhof komplete ŝanĝas sian opinion: li en dua artikolo samgazeta elektas Palestinon! “Hejmen! En malnovan patrujon! [...] Ni devas cedi [...] al movo Palestinon!”⁶

Apenaŭ kredebla kompleta renverso en kelkaj semajnoj! Ĉu Zamenhof estis ventoflago?

Ha! Lia tuta batalo por Esperanto, lia ĝentila⁷ sed firma lukto kontraŭ la reformemaj eminentuloj,⁸ lia nefleksebla rezisto kontraŭ la monotrezoro proponata de Javal⁹ male pravas nedetruiblajn persistemon sub plej diplomata konduto.

Do pro kia mistero Zamenhof, post konvinka pledo favore al “Ameriko”, tiel facilanime cedas al “Palestino”?

Ni vane serĉus argumentojn en lia dua artikolo. Li eĉ pludiras: “[...] malfacilaĵojn [...] vere pli multe [...] estas en Palestino, ol en Ameriko”. Kio do klarigas lian tujan rezignon? Ĉu li prezentas novajn kialojn favorajn al “Palestino”? Neniajn. Kial do lia kompleta turniĝo?

Mallonga estas la respondo: lia koro. Racia estis la elekto “Amerika”, sed elkora la elekto “Palestina”. Kiel rezisti al



1) Ludovikito, *Unua etapo de Esperanto*, p. 28-32.

2) citita verko, p. 35-61, Esperanta traduko de Holzhaus.

3) *Leteroj de Zamenhof, II*, p. 186.

4) *Kompleta korespondado Sigmund Freud – Karl Abraham*, letero 244F.

5) N.Z. Maimon: *La kaŝita vivo de Zamenhof*, p. 88-99.

6) Ludovikito, citita verko, p. 61-67.

7) Li delikate skribos sen supersignoj al sia mortanta amiko Javal, kiu abomenis ilin (vd. *Leteroj de Z, I*, p. 341).

8) *Leteroj de Z, II*, p. 195-341.

9) *Leteroj de Z, I*, p. 186.

“Palestino”, kiam oni apartenas al asocio, kies nomo estas Ĥibat-Cion, kio signifas “Amo al Palestino”? Kiel rezisti kiam oni jud-tradicie ripetas: “Venontan jaron en Jeruzalemo?” En tiu dua artikolo abundas historiaj kaj Bibliaj aludoj: “Egiptaj potoj” (nova aludo al La Eliro); “lakto kaj mielo” (aludo al Kanaano); “malnova patrujo; historia patrujo; malnova popola idealo; malnova standardo de Izraelo; malnova cindrejo; aspiro al Palestino...”. La rezonado ne plu validas; ekzemple la “malfekundeco de Palestino” estas de li konsiderata senvalora! Li ne hezitas aserti, ke la “tempo de rezonado pasis!” ke “estus peko defendi siajn personajn opiniojn...”.

Neniu nun aŭdacus riproĉi al li la venkon de lia koro super lia cerbo en la tiama situacio. Tamen tia cedo lia okazis por la unua sed lasta fojo. Neniam plu rompiĝos lia rimarkinda ekvilibro inter sentemo kaj racieco. Nur por eviti rektan malutilon al Esperanto li tre malfacile kaj por mallonga tempo konsentos ne deklami en Bulonjo tiun faman parton de la poemo *Preĝo sub la verda standardo*:

*Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj*

De la cionismo al la homaranismo

Malgraŭ sia daŭra “simpatio” al la ideo de cionismo, li rifuzos submetiĝi sub la “komuna standardo” de la cionista movado de Herzl de 1897¹⁰. Li pensos, ke li jam definitive superpasis tiun nivelon kaj atingis pli altan sferon, la alvenon de tutmonda popolo. Malgraŭ la oro de Javal li malakceptos cedi al gravaj ŝanĝoj pri Esperanto. Certe tre kruele por si, li tiel rifuzos landan kaj monan sekurecojn ankaŭ al sia familio. Poste, malgraŭ la ĝenerala malŝato al Homaranismo konsiderata utopio, li neniam rezignos pri ĝi, juĝante ĝin nemalhavebla ĝemelo de Esperanto. Ni vidis ke, laŭ li, popolon vivigas lingvo kaj religio: do al nova tutmonda supernacia popolo necese apartenu nova tutmonda lingvo kaj nova tutmonda religikoncepto.

Fine tiu miriga opiniŝanĝo en du sinsekvaj junaĝaj artikoloj Zamenhofaj pruvas ne lian facilanimecon, ne lian senpripensecon, sed male la jam aperantan en li pli altnivelan celon: la deziron krei unuiĝintan homaron, antaŭ kiu devas duarangi eĉ la judpopola problemo kara al li.

Johan'-Luko Tortel

10) Maimon, citita verko, p. 107, kaj *Leteroj de Z*, I, p. 109.

Kongresa omaĝo al Lapenna

La 5-an de novembro pasos 100 jaroj de post la naskiĝo de prof. d-ro Ivo Lapenna, unu el la plej grandaj organizaj figuroj de la movado kaj konstruinto de la moderna UEA.

Li forpasis la 15-an de decembro 1987, en la Zamenhof-tago de la Jubilea Jaro de la centjariĝo de Esperanto. Dimanĉon, la 26-an de julio, la 94-a UK omaĝis al li per speciala programero en salono nomita laŭ Lapenna.

Prezidanto Probal Dasgupta gvidis la programeron, kies ĉefparolanto estis John Wells, eksprezidanto de UEA kaj estrarano jam dum la prezidanteco de Lapenna. Personajn

rememorojn pri Lapenna prezentis d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof kaj Osmo Buller. La multnombra publiko povis spekti ankaŭ tri fragmentojn el filmitaj paroladoj de la granda oratoro, kiuj temis i.a. pri preparlaboroj antaŭ la akcepto de la Unesko-rezolucio en Montevideo kaj pri parolarto. Ĉar la antaŭenigo de homaj rajtoj estis proksima al Lapenna, oni aŭdigis ankaŭ diskon kun Esperante kantita parto el la Universala Deklaracio. La datreveno de Lapenna ricevis en Bjalistoko ankaŭ alian omaĝon: UEA lanĉis novan eldonon de lia verko *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*.



Foto: Andrzej Sochacki

Frandi grand-apetate

Vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto. Lingvaj premisoj, tipoj, specifeco kaj antologieto. Aleksandro S. Melnikov. San Marino/Moskvo/Rostov-na-Donu: AIS, 2008. 224p. 21cm. ISBN 9785903687015. Prezo: € 15,00



La libro okupiĝas pri la ludkrea lingvouzo en Esperanto. Tiu ŝajnas esti karakterizaĵo de nia komunikado. Verŝajne ne estas Esperanto-aranĝo sen iu ŝercemulo, kiu bonvenigas per “Salaton!” anstataŭ “Saluton!” aŭ ĉe atendado ĉe bufedo alude mencias “Veni, vidi, vici”. Certe pro tiu ofteco kaj pro sia ĉarmo luda komunikado jam staris en la centro de kelkaj studaĵoj. Mi volas mencii Ĝivoje (1973), MacGill (1986), Maul (1987), Fiedler (2001); elstaras la esploroj de Lloancy (1985) pri Raymond Schwartz. La nomo de tiu franca verkisto kaj kabaretisto ja estas nedisigeble kunligita kun la fenomeno vortludo en Esperanto, kiel la esprimo “ŝvarcaĵo” (NPIV p. 1125) montras. La plej freŝdatan kaj multflankan publikaĵon pri la temo nun prezentas la nova libro el la plumo de Melnikov.

Por sia libro la aŭtoro analizis milojn da ludkomunikaĵoj (kaj skribaj kaj parolaj) kaj klasifikas ilin en pli ol 40 tipojn. Ni trovas la tradiciajn vortludojn kun konataj terminoj, ekz. mistranĉoj (p. 186):

*Elektu mem, kun jak’ aŭ frak’
Mi venos laŭdezire.
Jen la decid’ de l’ tribunal’:
Ŝi diris nur: ‘Nu, dece!’
Kaj granda estis la skandal’,
Ĉar iris li ... nudece (R. Schwartz);*

ekz. ludojn surbaze de propraj nomoj:
*Iam li komprenis ke en informado ne helpas Lapenna
sed la peno (p. 28);*

ekz. ludojn surbaze de frazeologiaĵoj (kvankam la aŭtoro bedaŭrinde preferas terminon kun negativa konotacio – “kliŝo” – por tiu grupo):

*Ĉu meti aŭ ne meti? Tiel staras la demando – almenaŭ kiam
pri komoj temas. (p. 150).*

Krome ni trovas multajn novajn terminojn (ekz. “mis-aŭtonimumo”, “fantumo”, “misremumo”, “mismetonimumo” k.s.) por diversaj specoj de vortludoj en la klasifiko de Melnikov. La aŭtoro ja plej bone mem konas sian riĉan materialon kaj sur tiu bazo verŝajne taŭge subdividis ĝin. Krome antologieto de vortludoj kaj listo de uzitaj terminoj fine de la libro helpas kompreni. Tamen mi de tempo al tempo demandis min, ĉu necesas tiom komplika sistemo, ĉu leganto ne preferus, ni diru, klasifikon laŭ enhavaj grupoj (ludoj per propraj nomoj, per mallongigoj, per frazeologiaĵoj, per fremdvortoj, per stilfiguroj, per Esperanto-realaĵoj ktp.) aŭ eble laŭ la partoj de

la lingvosistemo (ekz. fonologiaj ludoj, leksikaj, sintaksaj, tekstaj, pragmatikaj ktp.), kiel oni trovas ilin en verkoj pri aliaj lingvoj.

Forta flanko de la libro estas, ke ĝi bonege montras la kulturon de la komunumo. Multaj el la prezentitaj ŝercoj aŭ aludoj ne estas plene kompreneblaj por homoj ekster Esperantio, kio pruvas ke la parolantaro estigis ion propran. Per la vortoj de la aŭtoro: “por plene ĝui ludan komunikadon oni ofte bezonas *specife E-kulturajn fonajn sciojn*” (p. 175). Kelkaj ekzemploj, kiuj spegulas aŭ lingvostrukturajn aŭ eksterlingvajn specifaĵojn de Esperanto:

Etino mia, via foreco malebligas [...] nian geon, ĉu vi baldaŭe apudos min? Sen vi, mia indulino, kiel aĉas la hodiaŭo! For de vi, njo ineto mia, kial antaŭeni ĝis la morgaŭo? [...] p. 10)

Uncle Zam wants you! (p. 95)

Servokapabla. Rekrutoj staras nudaj antaŭ ekzamenantaro. Militista kuracisto demandas junan bervalanon: – Kion signifas tiu ENTO tatuita sur via vira organo? – Mi estas fervora esperantisto, sinjoro kapitano, kaj en certaj gloraj momentoj miaj amikinoj povas legi la vorton ESPERANTO. Post unu horo la kuracisto denove vidas fortikan bervalanon kun generilo ornamita per ENTO. – Ha, ha, ankaŭ ĉe vi oni povas iafaje legi ESPERANTO, ĉu ne? – Ne, sinjoro kapitano, fiere diras la rekruto, ĉe mi estas legebla EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO (p. 71).

Kiel tiuj ekzemploj – kaj la riĉeco de la materialo en la libro entute – ilustras, luda komunikado abundas en Esperanto. Melnikov mencias du kaŭzojn por la “amasa vortludado en Esperantio”. Unue, la lingvo estas parolata en malgranda kolektivo (p. 147) – temas do pri la identecostabiliganta funkcio de luda komunikado (‘komune ridi’) – kaj due, la fakto, ke Esperanto-parolantoj estas minimume dulingvaj, kio “kondukadas al pli akra sento de lingva materialo” (p. 174) – temas do pri la alta metakomunika konscio, kiu estas karakterizaĵo de la komunumo. Sur tiu fono mi ne komprenas, kial la aŭtoro rilatigas tiom ofte al la rusa. Mi scias, ke la libro baziĝas sur la doktoriga/profesoriga disertaĵo de la aŭtoro, en kiu komparo kun etnaj lingvoj rolludis, sed en tiu ĉi libro, kies legantoj estu sciencistoj kaj laikoj kiujn interesas esprimeblecoj de Esperanto (kiel ni legas sur la dorsa kovrilo), la multegaj ruslingvaj ekzemploj nur ĝenas. Oni havas la impreson, ke Melnikov volas pruvi, ke Esperanto estas same luda kaj esprimriĉa kiel la rusa. Sed tion la planlingvo ne bezonas.

Ni ne forgesu, ke la kreintoj de tiuj multegaj vortludoj en la libro uzis 'fremd'lingvon. Mi ne povas imagi ke iu lerninto de la rusa (aŭ la angla, germana ktp) eĉ post multaj jaroj de studado kapablas tiom ludkree apliki negepatran lingvon. En la centro de la libro staru Esperanto mem.

La ĉefa celo de luda komunikado estas estigi komikon. La aŭtoro tial enkondukas al la "nocio ridinda/komika" komence de la libro (p. 40-45). Laŭ mia gusto tiu ĉi ĉapitro ne estas sufiĉe profunda kaj ne bone strukturita. Humurscienco estas nuntempe tre intense esplorata tereno. Melnikov mencias la gravajn nomojn de tiuj, kiuj metis la fundamenton (Aristotelo, Kant, Freud, Bergson, sur p. 146 Grice), sed ni ne lernas por kiuj teorioj ili staras. Iliaj verkoj ne troviĝas en la bibliografio, kiu cetere ne diferencigas fakajn verkojn de la fontoverkoj, en kiu la aŭtoro trovis la vortludojn. Kial sciencistoj rilatas ĝis la hodiaŭa tago al Freud (1905), kvankam la esploroj de Bergson el proksimume la sama tempo ne trovis pluevoluigon? Ĉu la kompreno de komiko kiel supereco aŭ agreseco validas ankaŭ por Esperanto-komunikado? Kiuj rilatoj estas inter komiko kaj la postuloj de Grice? "Nigra humuro" estas menciata nur en piednoto (p. 41). Por nefakuloj kaj legantoj de internacia komunumo laŭ mi difinoj de la ĉefaj terminoj kaj klarigado pri bazaj teorioj de la specifa fako estus utilaj.

Tamen mi kompreneble tutkore bonvenigas la libron de Melnikov. Ĝi prezentas trezoron de vortludoj kaj luda komunikado. Ĝi estas varioplena kun tre diversaj ŝercoj. Kelkaj kaŭzas laŭtan ridadon, aliaj subrideton, kelkaj eble enuon, ĉar oni jam konas ilin, kelkaj estas intelektuaj kontentigaj, aliaj "sub la zono". Pri gustoj oni disputi ne devas. Multaj estas instruaj, ĉar la malobeo kaj rompo de lingvaj reguloj ofte revokas la regulon mem.

Se mi estis tiom kritikema supre, tiam nur pro tio, ke mi pensas ke Melnikov verkis libron pri ege grava temo. Luda komunikado en Esperanto pruvas la altan nivelon de la fakta komunikado en tiu planlingvo, la parolantoj sentas sin hejme en siaj lingvo kaj kulturo. Laŭ mia scio tiu fenomeno ne estas evoluinta en alia planlingvo, nek imagebla en etna lingvo lernita kiel fremdlingvo. Ekster la esperantista mondo tiu aspekto de nia lingvouzo ne estas konata, ja eble eĉ neimagebla: unu el la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. Pro tio estus bona afero, se tiu libro aŭ partoj el ĝi aŭ almenaŭ informo pri ĝi aperus ankaŭ en etnolingvoj.

Sabine Fiedler

Menciita literaturo:

Fiedler, S. (2001): *Die B/blanke Wissenschaft – Luda komunikado en Esperanto*. En: Fiedler, S./Liu, H. (Red.): *Studoj pri Interlingvistiko*, p. 585-602.

Ĝivoje, M. (1973): *Esperantonimoj*. Milano.

Lloancy, M.-T. (1985): *Esperanto et jeu de mots dans l'oeuvre de Raymond Schwartz (1894-1973)*. Paris.

MacGill, S. (1986): *Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ'!*. Antverpeno.

Maul, S. (1987): *Vortaj (A)ludoj*. Antverpeno.

Panorama rigardo al la pasinteco

Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi. Hans Ulrich. Trad. Benata

Hengstmengel-Koopmans.

Dobřichovice: KAVA-PECH,

2008. 111p. 20cm. ISBN

9788087169018. Prezo: € 9,90


Kun granda plezuro mi legis ĉi tiun libron, kiu plej taŭgas por mezgradaj lernejoj, sed povas

interesi kaj amuzi ankaŭ pli aĝajn adoleskantojn kaj plenkreskulojn. La romano estas kvazaŭ panorama rigardo al Florenco en la 15-a jarcento, kiel la fronta kovrilo sugestas. La teksto prezentiĝas kiel rememoraĵo verkita de plenkreskulo, pri sia infanaĝo en Florenco. Tiu rakontas pri la periodo kiam li estis unu el la lernantoj de Leonardo da Vinĉi, dum lia edzino Giraga (kiu nun helpas al li rememori detalojn) estis la sklavino de nobela familio. Paolo, la eksa lernanto de Leonardo, surpaperigas tiun ĉi rakonton por sciigi al sia filo familian sekreton: tiu ĉi estas la nepo de la murdita nobelo Juliano de la Mediĉoj. Paolo konsideras tiun tekston ne kiel beletraĵon, sed kiel rektan familian konfeson, faritan por nur unu leganto: lia filo. Ties nomo estas Leonardo; jen nomo kiu permesas al ni diveni kiom profunde Paolo kaj Giraga amas la faman Leonardo da Vinĉi.

La rakonto estas atentokapta, plena de enigmoj kaj emociaj eventoj. La aŭtoro kreas kredeblan etoson de la tiama Florenco prezentante al ni: la krueleajn luktojn inter la nobelaj familioj, la teruran malriĉecon de la laboristoj, la sklavecon, la humiligan kondiĉon de la virinoj, la timegigan peston, la superstiĉojn, la neevoluintan staton de la medicino, la agresan praktikon de la sporto, la suferigon de la bestoj k.s.

La prilumanta personeco de Leonardo da Vinĉi donas optimismon kaj kuraĝon al la geknaboj Paolo kaj Giraga. Paolo priskribas la permanan preparadon de kolorigaĵoj por la pentraĵoj de la majstro, la sekretan studadon de homaj kadavroj fare de la majstro, la originalajn teknikajn elpensojn de la majstro (precipe la ĉapitro pri la sonĝa flugado de Paolo super Florenco per mekanikaj flugiloj ŝajnis al mi tre emocia) kaj eĉ diversajn aspektojn de la ĉiutaga vivmaniero de la majstro. Ĝuste tiuj ĉi aspektoj faras el la majstro kredeblan vivoplenan protagoniston. Ekzemple Leonardo da Vinĉi estas prezentata kiel aĉetanto de enkaŝigitaj birdoj, kiujn li desegnis kaj poste liberigis (jen atestita historia detalo) kaj Ulrich metas en lian buŝon tiajn vortojn: "Homoj kiuj manĝas birdojn ne scias kion signifas esti libera. Nur tiuj birdoj estas vere liberaj, kiuj povas forflugi." Tiaj vortoj ja estas kredeblaj, ĉar vere Leonardo estis vegetarano ekde sia frua junaĝo, kaj li obsediĝis de flugiloj kaj flugmaŝinoj sian tutan vivon. Tiu ĉi estas tipa ekzemplo pri la kongruo inter la historia vero kaj la literatura kredebleco en la tuta romano.

Hans Ulrich estas fama instruisto, kiu kreis tre sukcesan metodon por la instruado de historio, nun uzatan en multaj nederlandaj mezgradaj lernejoj. La tradukinto decidis elnederlandigi tiun ĉi libron intervjuante la aŭtoron pri lia instrumentado. Mi opinias ke estus ege oportune se ŝi elnederlandigus ankaŭ tiun intervjuon. Laŭ mi, la Esperanta kulturo (pro siaj neŭtraleco kaj internacieco) tre taŭgas por la disvastigo de tiaj beletraĵoj, pensigantaj la junajn legantojn pri la kaŭzoj kaj la efikoj de gravaj pasintaj sociaj eventoj, por ke ili havu pli klaran kaj kleran vidpunkton pri la nuno. **Luiza Carol**



Ankoraŭ tabua kaj nebula

Ido, unu jarcenton poste. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2007. 47p. 21cm. ISBN 2906134740. Prezo: € 5,10

La nuna verko konsistas el du disproporciaj kaj malsamkvalitaj partoj. La unua, 17-paĝa, sinteze periskopas la plej konatajn epizodojn de la Ido-krizo kaj la itineron de ties du ĉefaktoroj. La dua, 26-paĝa, koncize mikroskopas gramatikajn detalojn de la lingvo, kiun ili elpuŝis el Esperanto.

La historia parto konsistas el 18 etaj ĉapitroj sub jenaj titoloj: 1. Julio 1887 kaj la sekvo; 2. Aperoj de Esperanto en Francio; 3. La mistera markizo; 4. Beaufront, mirinda mitomaniulo; 5. La unua franca esperantisto; 6. La reforma malsano; 7. La reformpropono de 1894; 8. Buljono-ĉe-Mar, la unua kongreso; 9. Beaufront komencas distanciĝi; 10. Ĝenevo, la dua kongreso; 11. Beaufront kaj Zamenhof; 12. Aperoj de Louis Couturat; 13. La delegacio; 14. Diversaj lingvoprojektoj. 15. La oktobra perfido. 16. La destino de Ido. 17. La bilanco de la Ido-krizo. 18. La fino de Couturat kaj Beaufront.

Ĉi-parte Cherpillod prezentas sufiĉe vastan (kvankam tre resuman) superrigardon pri kompleksa fenomeno lingva, socia kaj eĉ persona. Lia analizo ne startas nek haltas ĉe la delegaciaj peripetioj. Jen lia ĉefa merito. Li sukcesas interplekti plurajn ŝajne disajn eventojn kaj individuajn strebojn, tiel ke oni kvazaŭ spektas kontinuan filmon inter 1887 kaj 1907, anstataŭ nur abruptan rompon post la komitataj kunsidoj en Parizo. La motivojn kaj celojn de la Ido-protagonistoj li elmetas iom supraj kaj ne tre originale, sed konvinke. Plej grava mi trovas lian subĉapitron, titolitan “Kiamaniere lingvo evoluas?”, en kiu li pravas la sakstratecon de konstanta reformemo. Pintas ankaŭ la 16-a kaj 17-a ĉapitroj, kaj granda parto de la 18-a, kie la aŭtora voĉo sonas sobre kaj senpasie, kvankam neniel tede.

Bedaŭrinde Cherpillod ne ĉiam sukcesas, precipe vortume, montri sin serioza kaj kredinda historiisto. La figuron de Beaufront, kiel kutime en verkoj ĉi-temaj, li senkompatate pilorias: “hipokrita bigoto”, “homo psike vundita”, kiu “neniam havis patron” (ĉu do li naskiĝis partenogeneze?), “preparis kontraŭ Zamenhof la plej perfidan agon imageblan”, “perfidis sin mem kaj la aliajn” kaj eĉ “ponardis Zamenhof-on en la dorson”. Ŝajne la aŭtoron aparte ŝokas la sendiplomeco de Beaufront, ĉar li ĝin mencias ne malpli ol trifoje. Couturat ricevas pli mildan trakton: ja “orgojla”, sed ankaŭ “pacemulo”, “inteligenta”, “brila intelektulo” kaj eĉ “glora filozofo”. Laŭ Cherpillod, “Couturat bone scipovis Esperanton”, kion mi tamen pridubas, vidinte la fuŝan stilon de liaj leteroj al Zamenhof. Iom strangas ankaŭ asertoj absolute fantaziaj: “la Esperanto de Beaufront estis en ties cerbo, la Esperanto de Zamenhof estis en ties koro”. Pri Couturat la aŭtoro prezentas similan kardiogramon: “fortis en li la intelekto ege pli ol la koro”, ĉe li “homa korvarmeco tute mankis”...

Feliĉe la dua parto klare kompensas la mankojn kaj ekscesojn de la unua. Ĝi konsistas el 18 ĉapitroj sub jenaj titoloj: 1. Ĝeneralaj trajtoj de Ido; 2. Fonetiko; 3. Forigo de la ĉapelitaj literoj; 4. Refarado de la tuta leksiko; 5. La finaĵoj *o* kaj *a*; 6. La sekso; 7. Forlaso de la akuzativo; 8. Nevariemo de la adjektivoj; 9. La personaj pronomoj; 10. La demonstrativoj; 11. La tabelvortoj; 12. La verboj; 13. La prepozicio *de*; 14. La derivado; 15. Du malsamaj evolumanieroj;

16. Esperantaj pruntaĵoj de Ido; 17. La literaturo en Ido. 18. Konkludo.

Celante pruvi, ke “pluraj aspektoj de Ido montras netan malsuperecon kompare kun Esperanto, sed ankaŭ pluraj aspektoj montras superecon”, Cherpillod deiras de malĝusta premo (lingvoj ja neniel “superas” aŭ superbela aliajn, ili simple diferencas unuj de la aliaj). Tamen li sukcesas elmeti tre interesan kaj instruan komparon inter la du lingvoj. Li promesas “objektivecon” kaj ĝenerale ĝin atingas, kvankam pri iuj punktoj li montras sin tro Ido-flata, kvazaŭ por kompensi la draŝon unuapartan. Ekzemple, la alfabeton de Ido li malprave opinias “pli simpla ol tiu de Esperanto” kaj pri ĝia senĉapeliĝo li eĉ asertas mirfrappe, ke “oni devas nur **laŭdi** la aŭtorojn de Ido”; iujn Ido-vortojn (*exhaustar*, *editar*, *saturdio* i.a.) li strange rigardas pli oportunaj ol la Esperantaj ekvivalentoj (*elĉerpi*, *eldoni*, *sabato*); la vorton *olima* li trovas “pli eleganta” ol *antaŭlonga* kaj “evidente pli preciza” ol *iam*; pri *mediko* (kuracisto), “tamen internacia”, li bedaŭras, ke ĝi “**ne** ekzistas en Esperanto”; la triseksecon de Idaj substantivoj li etikedas “tre racia sistemo”, eĉ “perfekta solvo”, forgesante aldoni, ke en la praktiko (do ekster gramatiko) ĝi montriĝas peza kaj apenaŭ utila; la trioblan infinitivon de Ido li taksas “tre oportuna afero”, preterlasante tion, ke post cent jaroj la idistoj ankoraŭ ŝvitas super la infinitivo *-or*, konstante misuzata.

Tamen, malgraŭ tiu disfoja manko de “objektiveco” kaj kelkaj eraroj pri Ido-vortoj, negravaj sed facile eviteblaj¹, la lingva parto, lerte verkita, trafas prezentas la ĉefajn gramatikajn diferencojn de la du lingvoj. Prave Cherpillod asertas Esperanton “pli izola ol aglutina” kaj Idon “nek aglutina, nek izola”, sed “esence fleksia, kun malgranda grado de aglutineco”. Konvinke li pravas Idon ne pli internacia, sed nur “ege pli okcidenteŭropa”, kaj sekve “malpli internacia”, ol Esperanto. Lian demonstiron, ke la “tuta Ida deriv-sistemo kuŝas sur miskompreno far Couturat”, kiu “konfuzis (verŝajne, nekonscie, senintence) siajn proprajn teoriojn kun la teorioj de Zamenhof”, mi trovas nerefutebla. Li montras ankaŭ, ke la Ido-radikoj estas diverskategoriaj, same kiel en Esperanto, kaj per tiu municio li prave repuŝas malnovan idistan riproĉon kontraŭ la zamenhofa sistemo.

La broŝuron garnas tri portretoj, tri grupaj fotoj, du librobildoj kaj kvar grafikajoj, krom du Ido-steloj, unu el ili sur la kovrilo.

Resume, malgraŭ siaj mankoj, la nuna monografio de Cherpillod, verkita per lia kutima stilo pura kaj flua, estas utila studilo pri temo ankoraŭ, unu jarcenton poste, iom tabua kaj nebula.

Gonçalo Neves

1) Ĝustaj tradukoj de *eldonejo*, *hejti*, *klopodi* estas ne *editeyo*, *varmigar*, *demarŝar*, sed *editerio*, *kalarizar*, *esforcar*; *omnivodie* estas erara anstataŭ *omnavorodie*; *patrulo*, *patrino*, *Jesu* ne plu ekzistas en moderna Ido (nun: *patro*, *matro*, *Jesu*); *prokrastinar* neniam ekzistis (ĉiam estis *ajornar*); kom misuzita anstataŭ *quale* (p. 30); *pos* (p. 26) mistradukita al *malantaŭ* (anstataŭ al *post*).



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

100 Jahre Deutsches Esperanto-Institut, 1908-2008. D. Blanke, W. Bormann, R. Fischer, U. Görtz, M. Haase, U. Lins, U. Maier, K.H. Schaeffer, G. Tucker. Kompilis G. Tucker. Nordwalde: Deutscher E-Bund, 2008. 84p. 21cm. Ilus. Germanlingva historio de Germana Esperanto-Instituto. € 6,30

Aventuro en mondo de ŝajnigado. Jean Codjo. Antverpeno: FEL, 2009. 40p. 21cm. ISBN 9789077066423. Daŭrigo kaj kompletigo de la antaŭaj du volumoj de la benin-kanada aŭtoro *Dialogo inter surduloj kaj La paŝo senelirejen*. € 5,70

Beletra Almanako 5. (Junio 2009). Red. J. Camacho, P. Daŝgupto, I. Ertl. Novjorko: Mondial, 2009. 173p. 22cm. Ilus. ISBN 9781595691361/19373327. Prozo originala kaj tradukita, poezio originala kaj

tradukita, teatro tradukita, eseoj kaj recenzoj. € 9,90

Cento anni di esperanto a Trieste. E. Tantin Ackermann, E. Doerfler, G. Martinez, G. Valente. Milano: Biblion, 2008. 273p. 24cm. Kolorilus. Itallingva. ISBN 9788896177020. Abunde ilustrita historio de la Triesta Esperanto-movado. € 23,70

Eŝperanto de poche, L'. Klaus Dahmann kaj Thomas Pusch. En la francan trad. J.-L. Texier kaj R. Triolle. Chennevières-sur-Marne: Assimil, 2009. 182p. 15cm. ISBN 9782700503999. Utilaj vortoj kaj esprimoj, praktikaj konsiloj kaj iom da gramatiko. € 12,60

In the Land of Invented Languages. Arika Okrent. New York: Spiegel & Grau, 2009. 342p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Anglalingva. ISBN 9780385527880. Fascina kaj amuza rigardo al la fenomeno "artefaritaj

lingvoj", kun aparta atento al Esperanto. € 19,50

Intervjuo kun Ludwig Schödl. Interview mit Ludwig Schödl. Intervjuis Fritz Wollenberg. El la germana trad. S. Hartwig. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des E-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2008. 48p. 30cm. Dulingva (germana, E) teksto de intervjuo kun longtempa germana esperantisto. € 4,50

Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz, Budapest. Libroj. II-a parto. Red. György Zsebeházy. Budapest: OIK, 2005. 506p. 30cm. ISBN 9637214291. Laŭtema bibliografio de ĉirkaŭ 6 000 E-libroj, kun nomindekso kaj titolindekso. € 42,00


Kien Ĉinio? Div. aŭtoroj. El la franca kaj germana trad. V. Lutermano kaj J.-M. Cash. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2009. 142p. 21cm.



ISBN 9782918300069. Dek du analizoj de diverslandaj aŭtoroj, aperintaj en germanaj kaj francaj revuoj. € 14,10

Malgajaj sonetoj. Malfrua Somero (pseŭd.). Beogrado: Etelka Kiss-Jakupović, 2009. 78p. 20cm. ISBN 9788691247904. 68 sonetoj inspiritaj de la (malgaja) vivo de la aŭtoro. € 3,60

Mise en facteur commun appliquée à la formation des mots composés, La. André Cherpillod. Courgenard: La aŭtoro. 8p. 21cm. Franglingva klarigo de la vortkunmetado en Esperanto. € 0,90



Mistiko en la komenco de la novtempa spiritovivo kaj ĝia rilato al la moderna mondriĝardo. La. Rudolph Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2009. 107p. 21cm. Provo respondi al la demando, kial aparta formo de mistiko kaj la komencoj de la nuntempa naturscienco pensado kunpuŝiĝis en la tempo de la 13-a ĝis la 17-a jarcentoj. € 9,90

Oktoobra Revolucio kaj la sekvoj. M. Lewin, H. Conert, R. Steigerwald. El la germana kaj franca trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2009. 45p. 21cm. ISBN 9782918300076. "La Oktoobra revolucio rezistas al la historio", "Bazoj kaj evoluo de la sovet socio", "Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj". € 7,50

Origino de Specioj, La. Karolo Darvino. El la angla trad. K. Lendon. Antverpeno: FEL, 2009. 431p. 21cm. Serio "Scienca Penso" n-ro 1. ISBN 9789077066409. Referenca verko kiu, post sia apero antaŭ 150 jaroj, influis ĉiujn vivosciencojn. € 22,80

Poemoj de Li Qingzhao (el Shu Yu Ci). Li Qingzhao. El la ĉina Shi Chengtai. Hongkong: Ĉina E-Eldonejo, 2009. 42p. 21cm. Ilus. Dulingva eldono (ĉina, E). Bukedo da poemoj de brila ĉina poetino de la komenco de la 13-a jc. € 3,90

Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj. La originala verkaro de Lidia Zamenhof. Kompilis J. Amouroux, Z. Banet-Fornalowa, M. Higasida, B. Westerhoff. Antaŭparolo de L.C. Zaleski-Zamenhof.

Antverpeno: FEL, 2008. 429p. 21cm. ISBN 9789077066386. Ampleksa kolekto de eseoj, artikoloj, paroladoj, rakontoj kaj leteroj. Aldone iom da materialoj pri la vivo de Lidia kaj kelkaj fotoj. € 22,80

Raportoj el Japanio 12. Jasuo Hori. Maebaŝi: Horizonte, 2009. 187p. 21cm. Ilus. ISBN 9784939088078. Trideko da raportoj kaj eseetoj. € 12,60

Romano pri la tri regnoj. Luo Guanzhong. El la ĉina Laŭlum. Beijing: Ĉina Fremdlingva Eldonejo, 2008. 1807p. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 44. Tri volumoj. ISBN 9787119054933. Historia romano pri la periodo 168-280. Unu el la kvar plej popularaj ĉinaj klasikaj romanoj. € 90,00

Spitaj – kiel hidrargo. Christian Declerck. Antverpeno: FEL, 2008. 207p. 21cm. ISBN 9789077066003. Romano pri homoj kiujn la vivo kuntrenas en diversajn direktojn kun apartaj komplikoj, propraj cirkonstancoj kaj solvindaj situacioj. € 18,90

Tri kubaj infanteatraĵoj. Dania Rodríguez García. El la hispana trad. J. de Jesús Campos Pacheco kaj V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2009. 111p. 21cm. ISBN 9782918300045. Tri fabelaj teatraĵoj el la plumo de premiita kuba aŭtorino. € 10,80

Vento sed kun spuro. Shi Chengtai. Hongkong: Ĉina E-Eldonejo, 2009.

222p. 21cm. Ilus. ISBN 9789889755867. Eseoj pri Esperantaj kaj ĉinaj temoj, kaj recenzoj de Esperantaj eldonaĵoj. € 9,90

Vivprotokoloj. Ĉiutagaj vivoj, rakontitaj de esperantistoj. Red. U. Becker kaj Z. Metz. Novjorko: Mondial, 2009 (2a eld.). 218p. 22cm. ISBN 9781595691378. Vivrakontoj de 31 esperantistoj el 14 landoj. € 14,10

Yvonne. Sonetoj malsekretaj. Timothy Brian Carr. Rotterdam: Bero, 2009. 251p. 18cm. Pere de pli ol 200 sonetoj, la brita poeto promenis la leganton tra

sia vivo, abunda je muziko, kino, vojaĝoj kaj futbalo. € 15,90

DISKO

Ina Esperanto-koruso "Radio" Pazarĝik, Bulgario. Dirigentas Angel Cenov. Piane akompanas Veska Atanasova. Pazarĝik, s.j. 29min. 12 ĥoraj pecoj originalaj kaj tradukitaj. KD. € 9,00



Profesoro Jansen

Prof. d-ro Wim Jansen, kiu lastatempe estis nomumita kiel eksterordinara profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo, faris publikan enoficiĝan prelegon la 4-an de septembro en la aŭlo de la universitato.

La tradicia akademia solenaĵo okazis en la ĉeesto de cento da personoj. Krom la rektoro k.a. profesoroj ĉeestis esperantistoj ne nur el Nederlando sed ankaŭ el aliaj landoj. La nederlandlingva prelego de prof. Jansen, titolita "Esperanto, lingvo aminda", intertempe estis eldonita de la universitato en presita formo. En la foto Gerrit Berveling, prezidanto de Esperanto Nederland, gratulas la novan profesoron dum la akcepto post la prelego.

Foto: Ko Hammer



Oficiala informilo

PATRONOJ DE TEJO

Argentino: M. Palomec. Finnlando: J. Pietiläinen. Francio: P. Lelièvre. Germanio: B.-A. Wickström. Usono: S. Cobb.

SOCIETO ZAMENHOF

Argentino: M. Palomec. Danio: B. Lapenna. Finnlando: H. Laine, S. Mattlin, H. Tuomola. Germanio: E. Kruse, M. & H. Stroinski. Italio: S. Stoppoloni. Japanio: Ĉieko & Hirokaz Doi. Koreio: Y. M. Kim, J.-K. Lee. Nederlando: A. & H. Bakker, P. Engwirda, M. van Erp-Hoeboer, J. Hoobroeckx-Dooren, S. Smits. Svedio: U. Luin, S. Svenonius. Usono: A. Casey.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de septembro

Konto Afriko: Nederlando: C. & R. Bossong 75,00; N. Van Iperende Vries 200,00; F. D. Van Zoest 25,00. Norvegio: E. Matland 50,00. Svedio: J. Hammarberg 28,69. Svislando: M. Grosjean 30,00. 94-a UK: Anonima 30,00. *Sumo ĉi-jara*: 1772,01.

Fondajo Ameriko: Belgio: G. Maertens 150,00. Britio: A. Montesinos de Gomis 100,00; M. Sims 68,97. Finnlando: T. Oittinen 50,00; R. Pyhälä 100,00; E-A de Finnlando 20,00. Germanio: Anonima 200,00. Svedio: J. Hammarberg 9,14. *Sumo ĉi-jara*: 2918,46.

Fondajo Azio: Japanio: J. Gotoo, K. Gotoo, H. Hayashi, H. Harada, F. Inumaru, N. Isogai, S. Kuzume, T. Lin, T. Nomra, S. Oonisi, T. Saito - po 15,05; H. Gotoo, M. Isaki - po 45,16; M. Iwai, K. Kai, I. Katoo - po 22,59; J. Itou 37,65; Y. Mizuno 30,12; T. Takehana 75,28; A. Aoyama, Y. Oozato, K. Sampei, Y. Ueno, E-Rondo de Matuyama, Miyazaki E-Soc., E-Ligo de Sikoku - po 15,07; S. Aikawa, Y. Hotta, T. Saitoo, H. Takahasi - po 30,14; T. Huzita, Y. Sawaya - po 22,61; Y. Aida 45,21; K. Iiyoshi 37,68; S. Micukaŭa 150,72; K. Syōzi 75,36; aŭkcio ĉe Kansaya 39,93. Pollando: I. Koutny 50,00. *Sumo ĉi-jara*: 1970,09.

Konto Novjorka Oficejo: Hispanio: L. Hernández 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 448,60.

Fondajo Canuto: Belgio: J. Pinto de Sousa 25,00. Brazilo: Anonima 360,00. Finnlando: K. Uber 20,00. Germanio: G. Macioszek 118,00. Hispanio: R. Canet Marin 60,00. Italio: Anonima 50,00. Kanado: R. Williamson 12,00. Nederlando: A. Bakker, H. Bakker, L. Demmendaal - po 30,00; R. Moerbeek 100,00. Diversaj malgrandaj: 2,00. *Sumo ĉi-jara*: 3721,75.

Konto Espero: Germanio: K. Fischer 20,00. *Sumo ĉi-jara*: 220,00.

Fondajo Junularo: Danio: Kultura E-Festivalo 14,00. Francio: D. Vasconi-Couturier 30,00. TEJO-budo dum 94-a UK: 5,17. *Sumo ĉi-jara*: 181,78.

Fondajo Hans: Brazilo: A. Fonseca de Melo 61,03. *Sumo ĉi-jara*: 61,03.

Domrenovigo: Francio: R. Raspall Fina (biblioteko) 24,11. *Sumo ĉi-jara*: 44,11.

Unesko: Francio: R. Triolle 200,00. Hispanio: R. Urueña 200,00. *Sumo ĉi-jara*: 400,00.

Video: Nederlando: R. Koot 12,00. Usono: W. Harmon 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 112,00.

Ĝenerala kaso: Francio: R. Triolle 124,70. Pollando: J. Poptie 8,90. Nederlando: F.D. van Zoest 25,00. Diversaj malgrandaj: 1,00. *Sumo ĉi-jara*: 822,53.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

KOTIZTABELO DE UEA POR 2010

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2010.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	36	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Belgio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	8	20	50	32	19	100
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/krono	105	260	650	415	250	1300
Finnlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Francio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Germanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Greklando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hispanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Islando/eŭro	10	24	60	36	22	120
Italio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Japanio/eno	1300	3200	8000	4800	2900	16000
Kanado/dolaro	14	35	87	52	31	174
Latvio/lato	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Norvegio/krono	80	200	500	300	180	1000
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	25	60	150	95	55	300
Portugalo/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	95	240	600	380	230	1200
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	30	18	11	60

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A: Bahamoj, Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago).

MA(-T): Individua Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*.

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*.

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*.

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA.

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen la membreco en UEA/TEJO.

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA).

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

Ĝenevo: Zamenhof-memortabulo reinaŭgurita

Unu bela surprizo plia en la jubilea Zamenhof-jaro: La 28-an de aŭgusto 2009, tagmeze, sur la muro de la ĝeneva domo en strato Vieux-Collège 12, estis reinaŭgurita la memortabulo, kiu enhavas jenan tekston: "En tiu domo loĝis en 1905 L.L. Zamenhof, iniciatoro de la lingvo Esperanto." Fakte en tiu domo Zamenhof restadis revene de la bulonja kongreso.

La inaŭguro ne estis simple privata ceremonio de esperantistoj, sed ĝin partoprenis altranguloj kiel la oficanta urbestro Rémy Pagani, persone, eĉ kun mallonga alparolado. Li memorigis la intergentajn konfliktojn en la tiama Bjalistoko, kiu kondukis Zamenhofon al la ideo krei Esperanton, kaj menciis la Universalan Kongreson, kiu ĉi-jare okazis en tiu pollanda urbo.

Mireille Grosjean, kun-prezidantino de Svisa Esperanto-Societo, nome de SES dankis la urbestron kaj la lokan Esperanto-grupon 'La Stelo' kaj rakontis pri sia plurmonata restado en Japanio, kie ŝi vivis ĉe pli ol dudek familioj. Krome ŝi raportis pri sia vojaĝo al Afriko, kie laŭ ŝia kompreno homoj ŝatas Esperanton, ĉar la franca lingvo estas la lingvo de la koloniistoj. Laŭ Mireille Grosjean, tri ĝis kvin milionoj da homoj nuntempe parolas Esperanton en la mondo.

Ĉeestis la inaŭguran ceremonion ankaŭ François Grin, profesoro de la Departemento franca pri Tradukologio kaj Tradukado de la ĝeneva universitato,



kiu estas konata al la esperantistoj pro sia favora pritakso de Esperanto. Kvankam li konfesis, ke li ne estas fakulo pri Esperanto, nek bedaŭrinde parolas tiun ĉi lingvon, kaj ankaŭ ne estas membro de iu Esperanto-cirklo, li ja vidas kelkajn allogajn ideojn, kiujn Zamenhof kaj Esperanto povus alporti sur la kampoj socia, politika kaj eĉ ekonomia. Kaj li diris kelkajn interesajn frazojn pri Esperanto el la vidpunkto de la lingva politiko. En tio li ĉefe tuŝis la problemojn de minacataj lingvoj, de la fremdlingva instruado, de la komunikado en plurlingva medio kaj de la multlingvismo. Menciante tri eblajn (sed ne tute kontentigajn) opciojn solvi la problemojn de la multlingva komunikado – simltanan tradukadon, multlingvigon de la homoj, aplikon de unusola lingvo – François Grin vidas en lingvo kiel Esperanto kadre de kompleksa strategio adaptinda al la diverseco de la situacioj de la komunikado kelkajn avantaĝojn: lernfacilecon, immanentan flekseblon, egaligan efikon en komunikado. Ĉiuj tiuj faktoroj havus apartan gravecon por Ĝenevo kiel internacia urbo. Esti internacia urbo ne signifas, ke ĉio fariĝas simple en la angla lingvo. Internacia signifas ankaŭ esti multlingva. Se oni do volus subteni la multlingvismon,

necesus konsideri kompleksajn lingvajn politikojn, kiuj konformus samtempe al diversaj strategioj. Inter tiuj strategioj François Grin tutcerte vidas ankaŭ lokon por Esperanto.

Post tiuj paroladoj la tabulo estis malkovrita kaj Rémy Pagani invitis la ĉeestantojn al eta aperitivo surtruara.

La historio de la ĝeneva Zamenhof-memortabulo estas longa: Laŭ sciigo de la urbestro ĝi aperis en 1934. Kiam en 1984 oni purigis la muron, la tabulo frakasigis kaj devis esti rekonstruita (la malnovan tabulon konservis Armand Cotton, membro de la ĝeneva Esperanto-grupo 'La Stelo', kiu nome de la estraro ankaŭ prizorgis la kontaktojn kun la diversaj ĝenevaj instancoj). Tiel ekestis la nuna tabulo. Ĉar la loka Esperanto-grupo 'La Stelo' neniam perdis la atenton pri la stato de la tabulo, oni komencis rimarki, ke plantoj pli kaj pli kovras ĝin. Pro tio membroj de la grupo antaŭ kelkaj jaroj direktigis al la urba administracio por peti la reflegon de la tabulo. Tiel aperis la ideo transloki la tabulon al pli videbla loko proksima, kaj purigi ĝin. Gazetartikolo pri la reinstalo de la memortabulo pri Zamenhof estis publikigita la sekvan tagon en la ĵurnalo *Tribune de Genève*.

Esperanto-Grupo 'La Stelo' Ĝenevo
Arlette Di Vetta, Prezidanto



SES 2009 – malvirtuala renkontiĝo de *lernu!*-uzantoj

“Somera Esperanto-Studado” (SES) verŝajne iĝos tradicio. Almenaŭ tion deziris plejmulto de la 90 ĉeestintoj el 23 landoj, kiuj partoprenis ĉi-jare SES-on en la urbeto Modra, Slovakio, inter la 10-a kaj la 18-a de julio. Dum tiu ĉi aranĝo okazis ankaŭ la dua *lernu!*-renkontiĝo (renkontiĝo de uzantoj de la retejo www.lernu.net).

La specifeco de tiu ĉi aranĝo estas, ke proksimume 50% (!) de la alvenintoj estas homoj, por kiuj SES estas entute la unua Esperanto-aranĝo. Tion kaŭzas ĉefe la fakto, ke plejmulto de la partoprenantoj estas “virtualaj esperantistoj”, t.e. homoj, kiuj lernas Esperanton ĉefe pere de la retejo www.lernu.net, kaj kutime ankaŭ uzas ĝin nur interrete. Tamen SES pruvis, ke eblas venigi tiajn homojn al “reala” E-aranĝo, kaj des pli – ke eblas kaj indas “enmovadigi” la *lernu!*-uzantojn. Spertojn pri tio akiris la organiza teamo jam pasintjare, kiam okazis la unua *lernu!*-renkontiĝo, kaj la rezultoj de enmovadigo estis ĝojigaj – pluraj el la SES-anoj sekve aperadis ĉe la postaj E-aranĝoj tra la jaro kaj tra la mondo.

Ĝuste la enmovadigo de la partoprenantoj dum SES estas grava tasko kaj serioza defio por la organizantoj – ofte ja pleje gravas la unua kontakto kun la E-movado, por ke oni decidu, ĉu la lingvo internacia indas je plua persisto kaj do indas investi siajn tempon, monon kaj energion en ĝin.

La kerno de la 8-taga somera E-lernejo estas 26-hora antaŭtagmeza kurso, dum kiu oni povas plibonigi sian Esperantoregn en ĉiuj niveloj. Instruado okazis ĉiutage antaŭtagmeze, en kvar niveloj, ekde absolutaj komencantoj, ĝis plej altaj progresintoj.

Internacia teamo de spertaj instruistoj prizorgis diligente siajn grupojn: Stano Marček (SK) komencantojn,

Dalia Pileckienė (LT) komencintojn, Petra Smidéliusz (HU) progresantojn, Márta Kovács (HU) progresintojn. La plej sperta grupo havis ankaŭ la eblon partopreni la seminarion “Flugiloj de malfacila vento”, kiun kungvidis ILEI-spertuloj: Radojica Petrović kaj Xosé Conde.

La posttagmeza programo estis riĉa kaj diversa – ekskursoj, manlaboroj, prezentoj, prelegoj, diskutrondoj, tabloludoj, sportoj, diversaj kursoj. Menciindas almenaŭ kelkaj el ili: prelegoj pri *lernu.net* kaj pri E@I, mini-kurso pri la slovaka lingvo, ĵonglado, spontaneaj kursoj de sambo, paroligaj rondoj por komencantoj, kanto-instruado, tuttaga ekskurso al Vieno kun vizito al la Esperanto-muzeo k.s.

Vesperaj kaj noktaj programeroj ĉi-jare abundis je muziko. Prezentitaj estis slovakaj popol-kantoj en Esperanto (popolmuzika grupo de Peter Sarnovský), barda koncerto de Georgo Handzlik, repa koncerto de Tone el Brazilo, muzikalaj kantoj de Atilla Schimmer el Vieno, Internacia vespero kun pluraj kantaj elpaŝoj.

La aranĝon kunorganizis E@I kaj Slovaka E-Junularo, kunlabore kun pluraj slovakaj esperantistoj. Ĉiuj helpantoj meritas grandan dankon – per sia laboro oni sukcesis realigi pluan enmovadigan E-aranĝon, kiu espereble plu kreskos kaj portos novajn “fruktojn” en la estonteco.

Laŭdinda kaj certe imitinda estis ĉi-jare la decido de kelkaj landaj asocioj de UEA subteni la ĉeeston de kelkaj siaj membroj en la aranĝo – ĉu pagante ĉu la vojaĝelspezojn aŭ eĉ la plenan sumon de la aranĝo.

Por ricevi pli da impresoj de la aranĝo rekomendindas viziti la foto-galerion de SES 2009: www.picasaweb.google.com/esperanto666.

La venontjaran SES oni planas okazigi en la slovaka urbo Piešťany tuj komence de julio (2.-10.7.2010), por ne malhelpi al esperantistoj la ĉeeston en E-aranĝoj en Kubo. Pli da informoj aperos sekve en la retejo www.lernu.net.

Peter Baláz

E@I-kunordiganto, SES-kunorganizanto



Michel Audibert (1930 - 2009) mortis la 21-an de julio en Bois Colombes (Francio). Li eklernis Esperanton en la 1950-aj jaroj dank' al J. Thierry kaj la kabaredo de R. Schwartz. Pli ol tridek jarojn li aktoris france kaj Esperante, i.a. en TESP (Teatro Esperanto de Parizo). Li rolis i.a. en *Sen eliro* de J-P. Sartre, en du UK-oj (1982 kaj 1983), kaj en *La forpasinto* de R. de Obaldia, ludata plurajn jarojn ekde 1984. Pli ol dudek jarojn li partoprenis preskaŭ ĉiuvendre la elsendojn de Radio Esperanto en Parizo.

Henny De Ketelaere (1928-2009) forpasis la 26-an de aŭgusto en Antverpeno. Filino de fervora esperantisto ŝi jam kiel junulino lernis Esperanton. En 1947 ŝi aliĝis al la Antverpena E-klubo, kiun ŝi servis en multaj estraroj. Ŝi estis LKK-ano pri loĝigo de la 67-a UK en Antverpeno (1982). Dum longa tempo ŝi estis korektisto de la Perkoresponda E-kurso de FEL. Sian fervoron por Esperanto ŝi heredigis al siaj infanoj, nepinoj k.a. anoj de sia E-familio.



Helga Farukuoye (1943-2009) mortis la 12-an de julio 2009 en Vieno. Ŝi lernis Esperanton de sia patro Emil Vokal. Post magistriĝo en 1971 ŝi ekdeĵoris kiel bibliotekistino en la Aŭstria Nacia Biblioteko, kun interrompo de 1980 ĝis 1984, kiam ŝi instruis la francan en Niĝerio kaj per siaj multaj E-kursoj kontribuis al la estiĝo de E-movado en tiu lando. En 1995 ŝi ekdeĵoris en la Internacia E-Muzeo, kie ŝi okupiĝis pri la datenbanko TROVANTO. Ŝi estis LKK-ano pri informado de la 77-a UK en Vieno (1992). Ŝi daŭre subtenis, i.a. per korespondaj kursoj, la niĝerian movadon, kion UEA rekonis per la Premio Deguĉi en 1998. En 1994 ŝi magistriĝis pri interlingvistiko en la Universitato de Budapeŝto. Ŝi pensiĝis en 2004 post diagnozo de kancero. Spite la malsanon, ĝis la fino ŝi plu gvidis sukcesajn E-kursojn en la Popola Altlernejo Brigittenau.

Felix H. Kat (1928-2009) mortis la 1-an de septembro en Leeuwarden (Nederlando). Li estis

membro de UEA ekde 1946, delegito 1966-2007 kaj mecenato de diversaj agadoj de UEA.

Sirkka-Liisa Lehtivaara (1917-2009) forpasis la 10-an de julio en Helsinko. Ŝi estis ŝatata kantistino, kiu prezentigis ankaŭ en kelkaj UK-oj. Por la 54-a UK en Helsinko (1969) aperis ŝia disko *Ĉi tie sola kantas mi* kun ses finnaj popolkantoj.

Jorge C. Mosonyi (1947-2009), prezidanto de Venezuela E-Asocio, pereis en trafikakcidento la 26-an de aŭgusto en Caracas. Antropologo-lingvisto, li aktivis por indiĝenaj lingvoj kaj estis fakdelegito pri lingvistiko.

Linhart Rýznar (1921-2009) forpasis la 9-an de junio 2009 en Sallgast, Germanio. Profesie kvalifikontrolisto, li estis delegito de UEA 1956-83 kaj poste ĝis 2007 fakdelegito pri magio kaj Cseh-metodo. Dum du jardekoj (1975-1994) li modele servis ankaŭ kiel ĉefdelegito kaj peranto de UEA por Ĉeĥoslovakio.

Jean-Louis Texier (1933-2009) mortis la 4-an de julio en Cerny (Francio). Li esperantistiĝis kiel skolto en 1947 kaj dum la Pariza UK (1950) la agema junulo



jam organizis etan ĵamboreon. En 1978 li eniris la estraron de Unuiĝo Franca por E-o kaj kunlaboris al la aĉeto de nova ĉambro por la sidejo de UFE. Li estis prezidanto de UFE 1979-85 kaj kasisto 1994-2004. Al la gvidado de UEA Texier kontribuis kiel komitatano 1986-95 kaj estrarano 1986-89. De 1998 ĝis 2004 li redaktis, sub la pseŭdonimo Nikolas II, la informan bultenon *OKAZAS*. Informado estis proksima al lia koro; li organizis eventojn kiel ekz. partopreno de UFE en Expolangues. Texier kunaŭtoris la vortaron *Grand Dictionnaire Français-Espéranto* (1992) kaj kuntradukis la lernolibron *L'Espéranto de poche* (2009). Li ĉeestis kvardekono da UK-oj kaj ofte organizis karavanojn al ili.

Dalibor Brozović (1927-2009)

Akademiano Dalibor Brozović, unu el la plej grandaj kroataj lingvistoj kaj grava figuro de la moderna kroata kulturo kaj socia vivo, forpasis la 19-an de junio en Zagrebo. Brozović naskiĝis la 28-an de julio 1927 en Sarajevo. Li doktoriĝis pri filologia scienco en Zagrebo (1957) kaj estis lektoro en la filozofia fakultato en Ljubljana (Slovenio, 1953-1956) kaj poste profesoro en la filozofia fakultato en Zadar (Kroatio, 1956-1990). Ekde 1975 li estis membro kaj ekde 1986 regula membro de la Kroatia Akademio de Sciencoj kaj Artoj (ĝis 1991 Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj), ekde 1986 membro de la Makedonia Akademio de Sciencoj kaj Artoj, kaj ekde 1989 membro de Academia Europaea (Londono). Li membris en la redakcioj de *Ĝeneralslava lingvistika atlaso* (Moskvo) ekde 1964 kaj de *Eŭropa lingvistika atlaso* (Florenco-Moskvo) ekde 1983. Lia scienca verkaro ampleksas pli ol 1000 bibliografiajn unuojn. Ĝis 1991 li estis direktoro de la Leksikografia Instituto "Miroslav Krleža" en Zagrebo. Brozović estis vicprezidanto de



la Kroatia Demokrata Unuiĝo (HDZ) ekde ties fondo en 1989, vicprezidanto de la Respubliko Kroatio en 1990 kaj parlamentano 1992-1995. Brozović esperantistiĝis en 1946. Fama kaj eble la plej influa lingvisto en Kroatio kaj Bosnio li preterlasis nenium okazon por esprimi sian apartenon al la Movado kaj subtenon

al ĝiaj ideoj. La prestiĝo de Esperanto en lia lando estas grandparte ĝuste lia merito. Li verkis porokazan Esperantan poezion kaj esperantigis poezion el la kroata, serba kaj makedona. Multaj liaj poemoj, prilingvaj artikoloj, kritikoj kaj recenzoj aperis en *La Suda Stelo* (1951-1959) kun la pseŭdonimo Bo Zorović, i.a. *Karnavala sonetaro*

pri esperantista vivo, reeldonita en la jugoslavia antologieto *Reeĥoj* (1961). En 1988 li fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li prelegis en la Internacia Kongresa Universitato de la 77-a UK en Vieno (1992) kaj estis prezidanto de LKK kaj rektoro de IKU de la 86-a UK en Zagrebo (2001). Brozović prezidis Kroatian Esperanto-Ligon ekde 1992, kiam ĝi fondiĝis kiel memstara landa asocio.



RETORIKO

Science redaktita, pense riĉiga verko de Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (tria eldono). 294p. 20cm. Bindita kun kromkovrilo. Prezo: €19,80. Triona rabato ekde 3 ekz.



En 2008 167 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK, kaj specialan donaceton. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Paroladoj pri Esperanto, Movado kaj kelkaj aspektoj de niaj lingvo kaj kulturo. La nova eldono enhavas du aldonajn paroladojn neaperintajn en la eldono de 1966. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2009 (dua eldono). 166p. 21cm. Prezo: €9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio
www.multimania.com/kosomo

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 28-an de novembro 2009 (10h00 - 17h00)

- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Ĉefpreleganto:
CARLO MINNAJA



Speciala temo:
IVO LAPENNA

La periodaĵoj de UEA kaj TEJO
bonvenigas ankaŭ vin kiel sian leganton en 2010!

Esperanto

11 numeroj jare, kun
po 24 paĝoj numere.
€ 38,00*

KONTAKTO

6 numeroj jare, kun
po 16 paĝoj numere.
€ 23,00*



6 numeroj jare, kun
po 16 paĝoj numere.
€ 12,00*

*La prezoj varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA.
Abonu rekte de UEA, aŭ pere de via landa peranto.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktoroj:

Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin.

Recenzoredaktoroj:

Frank Nuessel, Federico Gobbo.

Interlingvistika redaktoro: Mark Fettes.

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 70,00 eŭroj.

Institucia abono: 202,00 eŭroj.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

la nigra serio de KLEKS



Higieno de l' murdisto. Amélie Nothomb. 1999. 151p. €9,00

Ulica Zamenhofa. Roman Dobrzyński. 2001. 286p. €7,50

Verdeskaj pensoj. Georgo Handzlik. 2009. 133p. €6,00

La lada tambureto. Günter Grass. 2000. 533p. €36,00

Ebono. Ryszard Kapuściński. 2001. 329p. €22,50

Marta. Eliza Orzeszko. 1999. 256p. €12,00

Mondoĵ. Div. aŭtoroj. 2001. 216p. €16,50

Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Triona rabato ekde tri ekzempleroj de la sama titolo.

